

Esperanto - Praktiko

Monata gazeto por perfektigo en la Lingvo Internacia

(Monatsschrift zur Vervollkommnung in der Welthilfssprache)

Erscheint zu Anfang eines jeden Monats. — **Bezugspreise** siehe auf der ersten Innenseite. — **Anzeigenpreise** sind beim Verlag zu erfragen.



Eliras en la komenco de ĉiu monato. **Abonprezojn** vidu sur la unua en-hava paĝo. — **Prezoj por anoncoj** estas demandeblaĵ ĉe la eldonejo.

4 a Jaro Noj. 7-8 (43-44)

Julio-Aŭgusto 1922

Enhavo:

An unsere Leser! — Al niaj legantoj!	129
La Internacia Antaŭkongreso en Lübeck (kun bildoj)	130
La Leipzig-a Printempa Foiro 1922.	132
Esperanto en la praktiko	133
El Esperantujo	134
La 11a Germana Kongreso — Al Breslau! — Grava Sciigo — Postkongresa vizito en Kopenhago — Akademia Fakoj pri Konkursoj kaj Premioj	
Lingvaj demandoj	144
Lingvaj notoj — Ĉu „enda“ estas fakte necesa? — Demandaro	
Diversaj informoj kaj petoj	146
Bibliografio	146
Redakcia korespondo	146
Übungsteil für Esperantisten deutscher Zunge	
Esperanto-Korrespondenz-Lexikon für Kaufleute	147
Stilistische Übungen	150
Gebet unter dem grünen Banner — Preĝo sub la verda standardo.	151
Gedankensplitter — Aforismoj	152
Übungsaufgabe 6	152
Ergebnis der Aufgabe 4 aus Nr. 4	153
Por la tempo post laboro	
Legendoj pri Rübezahl	154
La parabolo pri la vaporŝipo	156
Anekdotoj	157
Vestfalia Kanto	157
Enigmoj kaj problemoj	158
Libro-recenzoj	158

Verlag (Eldonejo):

Esperanto-Verlag Ellersiek & Borel G.m.b.H.

Dresden-A. 1, Struvestraße 40

Für den
Selbstunterricht

eignen sich am besten die
**Unterrichtsbrieife zum Selbsterlernen
der Welthilfssprache Esperanto**

von Dr. A. Möbusz

Vollständiger Lehrgang in 10 Briefen
und einem Wörterverzeichnis

Preis (freibleibend): 30.— M

für mittelvalut. Länder 48.— M

„ hochvalut. Länder 60.— M

Probefrief 3.— M (Ausland 4.80 u. 6.— M)

Der in pädagogischer Hinsicht einzig da-
stehende Aufbau dieses Werkes und die
dem Lernenden durch eine zweckmäßige
Einrichtung gebotene Möglichkeit, über
alle ihm noch zweifelhaft erscheinenden
Fragen zuverlässige schriftliche Aufklärung
zu erhalten, bieten eine volle Gewähr
für die gründliche Erlernung der Sprache.

Esperanto-Verlag

Ellersiek & Borel G. m. b. H.
Berlin und Dresden

(Postscheckkonten: Berlin Nr. 29318,
Dresden Nr. 12781)

**Belega
poŝtkarta portreto**

de nia alte ŝatata iama reĝino

**Sino Marie Hankel
Dresden**

Originala fotografaĵo arte farita!

Bonega donaco por korespondantoj!

(Fotogr.: Otto Wehlitz, Rähnitz ap. Dresden)

1 ekz. 10.— M, 10 ekz. 90.— M

por mezvalutaj landoj plus 60%

por altvalutaj landoj plus 100%

Havebla ĉe

Ellersiek & Borel G. m. b. H., Berlin kaj Dresden

(Poŝtĉekaj kontoj: Berlin Nr. 29318,
Dresden Nr. 12781)

Dokumentoj de Esperanto

kunmetitaj de **Dro A. Möbusz** estas
la plej bona informilo pri la historio
kaj organizo de la Esperanta movado

Prezo (nedevisa): 40.— M

(por mezvalut. landoj 64.— M, por altvalut. landoj 80.— M)

Esperanto-Verlag Ellersiek & Borel G. m. b. H., Dresden 1

Ĵus estas eldonita:

Wilhelm Fricke

Universala Legolibro

Modelaj tradukaĵoj el la tutmonda
literaturo kaj originalaĵoj Esperantaj

Prezo 40.— M

por mezvalutaj landoj 64.— M

por altvalutaj landoj 80.— M

1 specimena ekzemplero kun rabato de 50%

Jen legolibro ampleksanta 176 paĝojn,
kiu ne nur egalvaloras al ĉiuj aliaj jam
ekzistantaj, sed en kelkaj rilatoj eĉ superas
ilin. Ĝi enhavas nur modelajn legaĵojn
en poezio kaj prozo de bonaj Esperanto-
verkistoj, nome 66 tradukaĵojn el la tut-
monda literaturo kaj 24 originalaĵojn en
Esperanto. La libro bonege taŭgas por pli-
perfektingo dum kaj post kursoj ĉiuspecaj.

Parton de sia honorario por ĉi
tiu verko la verkinto destinis
por la Esperanto-Instituto por
la Germana Regno!

Ellersiek & Borel

G. m. b. H.

Dresden-A. 1

(Poŝtĉekaj kontoj: Berlin Nr. 29318,
Dresden Nr. 12781)

Esperanto-Praktiko

Monata gazeto por perfektigo en la Lingvo Internacia
(Monatsschrift zur Vervollkommnung in der Welthilfssprache)

Erscheint nach dem 15. eines jeden Monats.
Bezugspreis: Für Deutschland, Freie Stadt Danzig, Memel- und Saargebiet, Luxemburg und Österreich 20.— M. halbjährlich, eine Nummer 4.— M.; für andere Länder gelten die nebenstehenden Preise. Vereine erhalten bei größeren Bezügen Nachlaß.



Eliras post la 15a de ĉiu monato.
Abonprezo eksterlanda: Por Bulgarujo, Ĉeĥoslovakujo, Hungarujo, Polujo, Rumanujo, Ruslando kaj la iamaj rusaj landoj, Sudslavaj Ŝtatoj kaj Turkujo 25.— M. duonjare, unu numero 5.— M.; por ĉiuj aliaj landoj (kun pli bona valuto ol la germana) 40.— M. duonjare, unu numero 8.— M.

Eldonejo kaj redaktejo: Ellersiek & Borel G. m. b. H., Dresden-A. 1, Struvestr. 40
Ĉefredaktoro: Friedrich Ellersiek. Redaktoroj: Max Butin kaj Karl Minor. — Enpresotaj manuskriptoj laŭbezone estas korektataj. Ne postulitaj manuskriptoj estas resendataj nur, se oni aldonis afrankajon por tio.

Noj. 7-8 (43-44)

Julio-Aŭgusto 1922

4a Jaro

An unsere Leser! Al niaj legantoj!

Die von Monat zu Monat steigenden Druckkosten sowie eine abermalige Portoerhöhung am 1. Juli zwingen uns leider zu einer weiteren Erhöhung des Bezugspreises für Esperanto-Praktiko für das zweite Halbjahr 1922. Der halbjährliche Bezugspreis beträgt vom 1. Juli ab:

für Deutschland, Freie Stadt Danzig, Memel- und Saargebiet, Luxemburg und Österreich 20.— M

für Bulgarien, Tschechoslowakei, Ungarn, Polen, Rumänien, Rußland und ehemalige russische Länder, Südslawien u. Türkei 25.— M

für alle anderen Länder. . . 40.— M

Wir bitten die Bezieher, die bereits einen Teil des Bezugspreises f. d. zweite Halbjahr bezahlt haben, den Restbetrag umgehend einzusenden, da wir nur dann die regelmäßige Weiterlieferung der Zeitschrift gewährleisten können.

Esperanto-Verlag Ellersiek & Borel
G. m. b. H., Dresden-A. 1

La de monato al monato plialtigantaj preskostoj kaj denova altigo de la poŝtaj sendkostoj je la 1a de Julio bedaŭrinde devigas nin al plua altigo de la abonprezo por Esperanto-Praktiko por la dua duonjaro 1922. La duonjara abonprezo de post la 1a de Julio estas:

por Germanujo, Libera Urbo Danzig, Memel- kaj Saargejoj, Luksemburgo kaj Aŭstrujo 20.— M

por Bulgarujo, Ĉeĥoslovakujo, Hungarujo, Polujo, Rumanujo, Ruslando kaj iamaj rusaj landoj, Sudslavaj Ŝtatoj kaj Turkujo 25.— M
por ĉiuj aliaj landoj 40.— M


Ni petas la abonintojn, kiuj jam pagis parton de la abonprezo por la dua duonjaro, senprokraste sendi al ni la restantan sumon, ĉar nur tiukaze ni povas garantii pri la regula plusendo de la gazeto.

Esperanto-Verlag Ellersiek & Borel
G. m. b. H., Dresden-A. 1

La Internacia Antaŭkongreso en Lübeck

La plej granda deziro de ĉiu Esperantisto estas, partopreni la mondfeston de la Esperantistaro: la Universalan Kongreson. Ne nur pro la okazo, tie studadi fremdajn landojn, urbojn kaj morojn, ne nur pro la multaj amuzoj, ne nur pro la ebleco, tie renkonti malnovajn amikojn kaj gajni novajn, ne nur pro la ĝuo:

multaj gesamideanoj ne estas riĉuloj. Se — kiel ĉi tiun jaron — la Universal Kongreso okazos en lando tre malproksima por la plej multaj el nia anaro, en lando, kies bona valuto malfaciligas, eĉ malpermesas al la plej multaj gesamideanoj en centra kaj orienta Eŭropo la viziton, ili malĝoje devas rifuzi



Lübeck: Preĝejoj St. Jakob kaj St. Katharinen

travivi semajnon en „familia rondo“; sed precipe — almenaŭ por ĉiu serioza Esperantisto — por tie pliperfektigi en la uzado de nia kara lingvo. Tial la internaciaj kongresoj estas nia Esperantista universitato, ĉar nur en kaj per la ofta buŝa interrilato kun alilingvanoj ni plibonigas nian prononcadon, ni lernas internacian buŝan stilon, ni evitas la gravan danĝeron, ke Esperanto disfalu en landajn dialektojn.


Bedaŭrinde ne ĉiu Esperantisto povas viziti ĉi tiun universitaton, ĉar la plej

la utilojn kaj agrablaĵojn de nia universitato.

Tamen ne! Ekzistas ja ankoraŭ la institucio de la Antaŭkongresoj, kies ĉefa tasko estas, kolekti la alvojaĝantajn kongresanojn, konatigi ilin reciproke kaj ebligi al ili komunan — se eble plifacilitan — vojaĝon al la ĉefa kongresejo. Krom tio la antaŭkongresoj al tiuj, kiuj ne povas viziti la Universalan Kongreson, donas okazon, partopreni internacian kongreson kaj tiel profiti la nomitajn avantaĝojn.

Konsiderante, ke Lübeck estas unu el la plej gravaj havenoj ĉe la Baltika Maro por la komunikado al Finnlando, konsiderante, ke la plej multaj kongresanoj — almenaŭ la okcident-, sud- kaj centro-eŭropanoj — *devas* vojaĝi tra nia urbo — ĉu ili uzas nian karavanon aŭ la regulajn ŝipojn el Lübeck kaj Stettin —, ni Lübeck-anoj prenis sur nin la malfacilan kaj respondecan taskon, prepari internacian antaŭkongreson en la vidinda kaj fame konata „urbo kun la oraj turoj“.


Jam per si mem Lübeck, kies nomon ĉiu lerneĵano konas el la historio, estas tre alloga. Enirinte la centran parton de la urbo, ĉirkaŭata de la Elbe-Travekanalo kaj de la riveroj Trave kaj Wakenitz, vi vin sentas kvazaŭ en la mezepoko. Ne dezertigita per brulegadoj aŭ militaj krueloj, ĝi konservis sian aspekton, kiun ĝi akiris dum la 12a—16a jarcentoj; nur kelkaj ĉefaj stratoj — bedaŭrinde, laŭ vidpunkto de amanto al antikvaĵoj — estas modernigitaj. Sed se vi tramigras la apudajn stratojn kaj stratetojn — tiujn en la okcidenta parto ĉe la haveno, kie iam loĝis la riĉaj komercistoj kaj patricioj, aŭ tiujn en oriento ĉe la kanalo, kie sidis la metiistoj —, ĉie vin salutas la mezepoko



Lübeck: Magistrata domo (norda flanko)

en la malvastaj kaj kurbaĵaj stratoj, en la laŭstuparaj frontonoj, en la belaj pordegoj.

Plej grandajn trezorojn de artaj riĉaĵoj vi trovos en la multaj preĝejoj, kon-



Lübeck: Burgtor (kastelpordego)

struitaj laŭ gotika stilo, precipe en la duturaj preĝejoj St. Marien kaj katedralo, aŭ en la muzeo, aŭ en la Schabbel- kaj Behn-domoj. Vizitu la magistratan domon, kie la senato kaj la burĝa parlamento en pompaj salonegoj nun regas la respublikon Lübeck, kie iam kunvenis la delegitoj de la Hanse-urboj, por konsiliĝi pri milito aŭ paco, kie oni decidis pri la sorto de homoj kaj landoj: kaj vi sentas spiron de la spirito en la iama ĉefo de la Hanse-unuiĝo. Sed mi ne malkaŝos tro multe: venu kaj vidu mem; vi tion certe ne pentos. Ni malsupreniru la ŝtuparon al la magistrata vinkelo, sidu ĉe glaso da bona vino, kaj antaŭ ni ĵ okuloj preterpasas la urbojn de la iama Hanse, kies blazonoj salutas de sur la muroj. Ni legos kelkajn pripensindajn enskribaĵojn en latina lingvo, ekz. „Navigare necesse est, vivere non necesse“, tradukita: Estas necese, ke ni veturu sur la maro, sed ne estas necese, ke ni vivu; (Pripensu tion, vi veturontaj al Helsinko!) aŭ en platgermana lingvo proverbon, kiu signifas: „estas facile, komenci gravan aferon, sed malfacile, ĝin honore fini“ (Pripensinda por troentreprenemuloj!). Ankaŭ la enskribaĵo sur la Holstenpordego, kiun ni preterpaŝas, irante el la stacidomo al la urbo, nin Esperantistojn

serioze admonas: Concordia domi, foris pax, t. e. se vi harmonie interkonsentas inter vi, vi havos pacon (aŭ sukceson) eksteren. Kiu pli ŝatas naturajn belaĵojn, promenu al la mueleja lago ĉe la katedralo, sur la iamaj remparoj, al la Wakenitz vivigata per multego da ŝipetoj, al la antaŭurboj kun ĝiaj longaj ombrozaj aleoj de tilioj kaj belaj vilaoj, en la ĉirkaŭaĵon ravigantan per ĝia riĉeco de arbaroj, lagoj, montetoj, fine al la belega Baltika Maro, kiun ni admiras en la marbanejo Travemünde.

La preparoj por la Antaŭkongreso estas finitaj, la invitoj dissenditaj, nun venu grandamase, ni promesas al vi

kelkajn interesajn kaj agrablajn tagojn en nia urbo kaj en internacia samideanaro! La plej rekta vojo al Lübeck estas por eksterlandanoj tra Breslau—Berlin, Dresden—Berlin, Frankfurt—Hannover, Köln—Bremen. Jam dumvoje, ekz. en Berlin, la kongresvojaĝantoj estos salutataj de la tieaj gesamideanoj, en Hamburg, kie ĉiuj nomitaj fervojlinioj kuniĝas, la gruparo eĉ projektas je la 2a de aŭgusto antaŭ-antaŭkongreson. Do venu el ĉiuj direktoj, via karavano kresku kiel lavango, ĝis kiam ĝi fine superŝutu la urbon Lübeck dum kelkaj tagoj per centoj da verdaj steloj!

Dr. A. Möbusz

La Leipzig-a Printempa Foiro 1922

La Leipzig-a Printempa Foiro, okazinta en marto 1922, inter ĉiuj foiroj, kiuj ĝis nun okazis en kaj ekster Germanujo, okupas apartan rangon, ĉar neniam ĝis nun iu foiro montris similan multnombrian partoprenon aŭ simile grandan aĉeton kaj vendon de komercaĵoj. 155 000 komercistoj vizitis la Foiiron, kiuj nature ĉefe apartenis al la Germanaj industriistaro kaj komercistaro, sed grandparte ili ankaŭ estis eksterlandanoj. Ĉirkaŭ 32 000 foiruloj venis el negermanaj ŝtatoj: el Egiptujo 50, Afriko 10, Ameriko 1210, Azio 210 (el Hinujo 40, Japanujo 90, Hindujo 50, Persujo 20 vizitintoj), Aŭstralio 10, Belgujo 1110, Bulgarujo 290, Danujo 1280, Danzig 80, Anglujo 2320, Estonujo 100, Finnlando 220, Francujo 860, Georgujo 10, Grekujo 170, Holando 5060, Italujo 1280, Jugoslavujo 400, Letonujo 360, Litovujo 70, Luksemburgo 100, Memel-regiono 10, Norvegujo 530, Aŭstrujo 3050, Polujo 820, Portugalujo 60, Rumanujo 540, Rusujo 350, Svedujo 1550, Svisujo 1880, Hispanujo 610, Ĉeĥoslovakujo 5790, Turkujo 170, Ukrainja Lando 120, Hungarujo 990, Armenujo 30, krome ĉirkaŭ 100 personoj el aliaj nacioj. Tia vizitintaro denove evidentiĝas la internacian karakteron de la plej granda foiro de l' mondo kaj pruvas denove, ke la malnova Leipzig-a Foiro estas kaj restas la granda internacia merkato, grava ne nur por la germana kaj

mezeŭropa vizitintaro, sed por la tuta mondo. La internacieco de la Foiro montriĝis ne nur per la aĉetintaro, sed ankaŭ per la ekspozitintaro; ĉar inter 700 eksterlandaj ekspozitintoj ĉi-tiujare estis reprezentataj ne nur la eŭropaj ŝtatoj, sed ankaŭ transmaraj landoj, produktantaj krudajn materialojn, ekz. la Sudafrika Unio; tio estas atentinda progreso sur la vojo al ĉion ampleksanta mondfoiro.

Al la grandega nombro de l' vizitintoj korespondis la komercado, kiun partoprenis la en- kaj eksterlandaj vizitantoj kun same forta aĉetemo. La eksterlandaj foiruloj profitis per la malalta valuto, la enlandaj foiruloj aĉetis tre avide pro la minacanta plialtiĝo de l' prezoj. Oni havis la konvinkon, ke oni nenie povas aĉeti tiom sufiĉe kiom en la Leipzig-a Foiro. Pro la grandega aĉetemo la disponebla materialo de la plej multaj branĉoj estis alĉerpita jam dum la unuaj tagoj, kaj ankaŭ la novaj produktotaĵoj de la sekvantaj monatoj, eĉ ĝis la fino de l' jaro, estas elĉerpitaj. Tio, kion oni ofertis dum la Leipzig-a Foiro — kaj en la Specimenfoiro en la centra urbo, kaj en la Foiroj por Tekniko kaj Konstrufako sur la ekspozeja teritorio — estis bonkvalita kaj pro tio tre dezirata. La foiraj specimenoj donis klaran bildon pri la tutgermana produktado kaj pri multaj gravaj eksterlandaj produktotaĵoj. Precipe dum ĉi tiu foiro oni denove vidiĝis, ke la loka kaj tempa kunigo de ĉiuj foiraj aferoj donas grandan avantaĝon.

Esperanto en la praktiko

Estis meze de Aprilo, kiam mi verkis raporteton pri ĉi tiu temo. Ni festis Paskon. Spirite mi staris antaŭ la modesta tomo de l' majstro en Warszawa. Antaŭ kvin jaroj li fermis siajn okulojn por ripozadi post laborplena vivo. Super lia tomo ŝvebas kvazaŭ nubosimila estaĵo lia verko, fortiĝinta, kreskinta, senhalte distvastiganta surtere inter la homoj. Ĉu li antaŭsentis ĉi tiun fruktodonan tempon de l' evoluo, de l' paŝado al venko? Sendube, jes! Se ni staras antaŭ lia ripozejo, nin trapenetras magia sento de forto spirita, volo homa kaj beno ĉiela. Verdiĝis intertempe la arba foliaro. En la verdeco ne nur kaŝiĝas la espero, sed ankaŭ simbolo ĝi estas de senmorteco, de ĉiam revenanta printempo.

Kvazaŭ paskodonaco estis la *oficiala subvencio de la Finnlanda registaro*, kiu helpeme donis 50 000 Fmk. por nia *XIVa en Helsinko*. Same la *urba administracio de Düsseldorf (Germ.) subvencias* la asocian tagon de la *Germ. Laborista Esp. Asocio per 10 000 Gmk.*

La plej grava okazintaĵo dum la Paskaj tagoj estis la *Internacia Konferenco de Instruistoj en Genève*, celanta la enkondukon de E. en la lernejojn. Ĉi tiu konferenco, unika kiel la unua internacia konferenco de edukistoj ĝis nun okazinta, altiris al Genève grandan aron de instruistoj de E. el diversaj partoj de l' mondo. Pro manko de loko estas neeble, detale preparoli ĉi tiun gravan kaj tre sukcesplenan konferencon. La reprezentantoj de 16 registaroj kaj multaj instruistoj el 28 landoj (i. a. 6 reprezentantoj kaj instruistoj germanaj!) *submetis manifeston al la Ligo de Nacioj*, petante akceli la instruadon de E. ne nur pro ĝia utileco por komerco, scienco ktp., sed ankaŭ pro ĝia valoro kiel stimulo al tiu amika interrilatado inter la popoloj de l' mondo, kiu estas la vera celo de la Ligo.

Intertempe venis Pentekosto, la ĉarma festo, kiel diris nia granda poeto Goethe. Pro grava motivo la preso de la raporto ne povis okazi. Sed mi ne dubas, ke la legantaro ne koleros pro la praktikaĵo.

Junio estas fakte ĉarmega monato, precipe portuĝoj, kiuj promenadas vespere kune kun la amatino. La printempa burĝonado de ĉiuj kreskajoj instigas la homojn al simila faro. Verdire mi ne burĝonis ekstere, sed eble interne de mia koro okazas io, kion kaŭzis la „vekiĝo“. Same ankaŭ la komerca vivo vekigas ĉiun printempe. Foiroj kaj ree foiroj! Daŭros ne plu longtempe, kaj ĉiu urbo aranĝos propran foiron. Ni ne ironie ridu pri tiu fakto, ĉar ĝi ne nur helpas la evoluadon de l' mondkomerco, sed ankaŭ estas tre profitodona koncerne la disvastigon de la praktika uzo de la lingvo internacia.

En Majo okazis la *Pariza Foiro*, kies 18 hektar-granda surfaco kovris la „Espanade des Invalides“ kaj „Champs de Mars“. La foira komitato estis senpage doninta grandan budon (ne legu „Budho-n“!) al la Pariza Esp. Grupo, por instali oficejon. Tie deĵoris diligentaj verdsteloj, disdonante propagandilojn, reklamilojn, afiŝojn ktp. Multkolora granda afiŝo Esperantlingva atentigis ĉiustrate pri la grava manifestacio de l' franca komerco. La gazeto „Excelsior“ raportis detale pri la Esperanta ludo kaj la profitoj akirotaj pere de E.; bildo ornamis la artikolon. Ankaŭ la komerca revuo „Les Echos“ kaj la oficejo de l' fervojoj Paris—Orléans elmetis afiŝetojn en ilia budo rilate al E. Multaj ekspoziciantoj disdonis gvidlibrojn kaj komercajn cirkulerojn en franca kaj Esperanta lingvoj. Tuta amaso flugetis sur mian skribotablon, kaj ni rajtas paroli pri granda sukceso.

Similaj budoj troviĝis sur la ekspoziciejoj de la *Regiona Foiro de Orléans* (9.—16. Junio) kaj de la *Internacia Foiro de Bordeaux* (15.—30. Junio). Baldaŭ foiro sen Esperanta budo estas fabelo. Ni ĝoju pri la rajtigita trudemo de niaj pioniroj senlace laborantaj por afero sankta!

Sian *trian foiron* preparas la ĉeĥa urbo *Reichenhall* (ĉeĥe: Liberec). Bela gvidilo jam nun estas dissendata, tre bona esperantlingva informilo, kiu atentigas le komercistaron pri la plej granda teksaĵa merkato de l' kontinento. La spertoj, dum la unuaj foiroj faritaj rilate la uzon de E., estis tre kontentigaj kaj

instigis al alpreno de la lingvo por la korespondado. Turnu vin al la Esperanto-Fako de la foira oficejo, por ricevi la efikan propagandilon.

La *Foiro de Frankfurt a. M.* dissendis „Ekonomian Flugfolion“, kies interesa enhavo meritas plej grandan diskonigon. Postulu ĝin de Meßamt, Esperanto-Fako, Frankfurt a. M.

Esperantlingvan cirkuleron eldonis la *Foiro de Lyon*, kies oficejo korespondas Esperante. El Svedujo ni ricevis la sciigon, ke la oficejo de la *Ekspozicio en Göteborg* okazonta en 1923 (300 jara jubilea ekspozicio) uzas Esperanton por la korespondado. Adreso: Utställningsbyrå, Göteborg (Sved.). Niaj laboremaj samcelanoj de *Padova* (Ital.) deĵorantaj en la foira oficejo, ree dissendis grandnombre detalan Esperantan katalogeton kiu enhavas planon de la foira kvartalo, regularon, programon kaj pluajn sciindaĵojn.

Do, ĉie en la mondo oni sukcesplene „foiradas“ (nova verbo!). Jen taŭga kampo por semi, semadi konstante la verdajn „Esperanterojn“, kies spikojn falĉos feliĉa homaro en tre baldaŭ venonta nova kulturepoko!

Antaŭ kelkaj semajnoj kunvenis en *Bruxelles* (Belg.) la *Internacia Farmaciista Federacio*. La partoprenintoj decidis ellabori farmokopean terminaron en franca, angla, germana kaj Esperanta lingvoj.

Ni ĝoje konstatas la fakton kaj la intereson de la „venenmiksistoj“, kiuj ĝenerale uzas nur la latinan lingvon en sia profesia laboro. Estas menciinde, ke ili ekkonis la valoron de nia mondhelpingvo, la latina lingvo niatempa. Ni ja ne plu vivas en la mezepoko kaj ankaŭ ne plu portas pudritajn perukojn.

Rilate la uzon de E. en la lernejoj nur kelkaj notoj: En *Karlovo* (Bulg.) E. estas instruata en la progimnazio. Nedevigaj E.-Kursoj komenciĝis en kvin popollernejoj en *Potsdam* (Germ.), same en la *Humboldt-Akademio* kaj en la popola altlernejo *Schöneberg-Friedenau*. En *Hagen* (Germ.) oni instalas E.-kursojn por geknaboj en la popollernejo.

La *Norvega Asocio de Librobindistoj* en sia ĝenerala kunsido en *Kristiania* akceptis la rezolucion, uzi E. interrilatante kun eksterlandaj kolegoj. Ekkoninte, ke

la neŭtrala lingvo E. jam estas disvastigata tra la mondo kaj praktike uzata en la servo de laboristoj, ĝi admonas la norvegajn laboristojn kaj la tutmondan sindikatan asocion de la laboristaro, disvastigi la konon pri E. kaj ĉie instrui la lingvon.

Ree maturiĝis frukto de l' arbo, kies verda foliaro ŝirmas mondpacon kaj interkomprenon. Nia diligenta kolegaro ...

G. Ajuł

El Esperantujo

La 11a Germana Esperanto-Kongreso

Breslau, 3.—6. Junio 1922

Post kiam en la nunmonata numero de Germana Esperantisto jam estas publikigitaj du raportoj pri la nunjara ĉefkunveno de la germana esperantistaro, estas iom malfacile por mi, verki trian por la amikoj de mia „infano“. Sed kiel bona patro mi devas zorgi ankaŭ senpere por la bonstato de mia infano, t. e. kontentigi ĝiajn favorantojn per speciala raporto pri la irado de la kongreso en Breslau. La legantoj, kiuj jam konas la supre diritajn raportojn el G. E., bonvolu pardoni, se mi faras ripetaĵojn; sed ĉi tiaj ne estas eviteblaj, ĉar okazintaj faktoj ne estas prisilenteblaj nek alligeblaj. Sed mi klopodos, iom individuigi mian raporton, por ke ĝi almenaŭ en tio diferencu de siaj antaŭuloj.

Antaŭ la kongreso

„Ha, sinjoro profesoro! Bonan matenon! De kie vi venas?“

„Bonan matenon! El Werdau, kie mi partoprenis familian feston.“

„Do ni kune veturos al Breslau, ĉu ne?“

„Kompreneble, se plaĉas al vi!“

Per ĉi tiu interparolo kun la konata direktoro de la Germana Esperanto-Instituto en Leipzig ĉe la biletkontrolero en la ĉefstacidomo de Dresden komenciĝis mia alkongresa vojaĝo vendredon, la 2an de Junio. Ĉi tiu tago estis speciale grava por mi, ĉar en ĝi mi komencis novan jaron de mia vivo. Tio estis kaŭzo por festi la tagon jam en la vagonaro kaj poste ankoraŭ pli en Breslau. Bedaŭrinde mia edzino ne povis partopreni en tio, ĉar ŝi nur malfrue vespere alvenis el Berlin.

Sur la perono antaŭ nia vagonaro atendis nin nia plejaĝulo en Esperantujo, amiko Wallon, kiun mi kvazaŭ perforte estis insti-

ginta al partopreno en la kongreso. Li jam konsideras sin superfluulo — kvazaŭ li estus bopatrino! — kaj nepre volas fondi klubon de kadukaj esperantistoj. Se li, kunfondinto de la Loka Grupo de Breslau, estus mankinta en la kongreso, ĉi tiu estus estinta supo sen salo. Poste aliĝis al ni ankaŭ Dro Hotzelt al Bamberg, kaj en Dresden-Neustadt nia rondeto pli grandigis de samideanoj venintaj el Leipzig, i. a. f-ino Kaethe Jahns el Braunschweig kaj mia kolego-konkuranto Kötze el Leipzig.

Kiam tri germanoj kunvenas, ili fondas unuigon aŭ ludas skaton. Novan unuigon ni ne scias fondi en tiu momento, do prof. Dietterle, amiko Wallon kaj mi ekludis „daŭroskaton“, en kiu nia kara profesoro estis preferato de l' feliĉo. Nur lia poŝhorloĝo ne konsentis pri la ludado: propramove ĝi forlasis sian kutiman restadujon, la vestopoŝon, kaj saltis en — unu el la pantalonaj tuboj de sia posedanto, kiu nur pene povis kapti ĝin en la ŝtrumpo.

Sed ĉi tiu stranga okazintaĵo, kiu por superstiĉulo certe estus estinta malbona antaŭsigno, ne malhelpis la profesoron, en la posttagmezo de l' sama tago kaj en la antaŭtagmezo de l' venonta tago prezidi — asistate de s-roj preposto Becker kaj studkonsilanto Knopf — dek ekzamenojn pri instruisteco kaj ok pri kapableco. La ekzamenoj okazis en la belaj biblioteka kaj konferenca ĉambroj de l' gimnazio de St. Matthias.

* * *

Sur la stacidoma perono en Breslau ni estis afable akceptataj de Aho kaj Goho (aŭ la granda kaj la malgranda Ho), t. e. s-roj *Alfred Hanuschke* kaj *Georg Habellok*, la „animoj“ de l' kongreso. Estas nedireble, kion ili faris kaj kiom ili laboris por la bona sukceso, kiun la kongreso efektive havis. Ili meritas la profundan dankon de la estraro de G.E.A. kaj de ĉiu kongrespartopreninto pro ilia vere modela organizado. Ĉi tiu montriĝis tuj, kiam oni de la perono iris en la grandan halon de la stacidomo: Ĉi tie atendis la kongresanojn granda aro da helpantoj — esperantistaj knaboj el la lernejo de rektoro Driesler — kiuj kun brilaj okuloj ĉirkaŭis la alvenintajn kongresanojn kaj kvazaŭ forŝiris el iliaj manoj la pakajojn, por porti ilin en la loĝejojn.

Ankaŭ la loĝigo estis bone aranĝita laŭ la deziroj de la kongresanoj. Mi kaj mia edzino estis bonege gastigitaj de samideano Schnabel kaj lia filino, kiuj faris ĉion por agrablighi al ni la restadon en sia hejmo. Ankaŭ multaj aliaj kongresanoj trovis agrablan akcepton en samideanaj familioj.

* * *

Vendredon posttagmeze okazis jam kunsido de la ekzamenaj komisaraj de l' Esperanto-Instituto kaj ankaŭ kunsido de l' German Akademia Esperanto-Asocio. Ĉi tiu daŭrigas siajn laborojn sub la nova nomo „Scienca Esperanto-Ligo“, kaj ĝia prezidanto fariĝis prof. Dro Göhl.

* * *

Vespere kolektiĝis malgranda rondelo de jam alvenintaj kongresanoj en *Vinzenzhaus* por salutado kaj interkonatiĝo. En la bele ornamita domo estis la oficiala Akceptejoj, kaj en ĝi okazis ankaŭ ĉiuj kongresaranĝaĵoj. Oni povas diri, ke ĝi estis vere ideala kongresejo. Estis nur bedaŭrinde, ke ĝia mastro ne pli multe klopodis kontentigi la esperantistajn gastojn laŭ gastronomia vidpunkto.

* * *

Sabaton (3. 6.) matene je la 5^{1/2}a mi jam estis kun Goho en la stacidomo por akcepti la „larĝan mason“ el Lübeck, t. e. amiko Dro Möbus, lian kongresedzinon, t. e. f-ino Stein, kaj nian komunan amikinojn f-inojn Jacobs el Flensburg. Kune kun ili venis ankaŭ amiko Epstein el Hamburg kaj aliaj samideanoj de la „akvorando“. Post la salutado mi veturis hejmen kune kun Goho kaj f-ino Jacobs, kiuj loĝis ĉe familio Habellok, por daŭrigi mian tro frue interrompitan dormon. Sed, ho ve, mi forgesis la koridoran ŝlosilon kaj nun staris antaŭ fermita pordo. Kion fari? Miajn gastigantojn mi ne volis vekti, mia edzino dormas kiel marmoto kaj certe ne estus aŭdinta mian frapadon — do mi reiris al la proksime loĝanta familio Habellok, kie mi ricevis bonegan kafon kaj babilante pasigis agrablan horon.

* * *

En la ĉefstacidomo troviĝis provizora Akceptejo, kie la kongresanoj alvenintaj antaŭ la oficiala komenco de la kongreso ricevis siajn dokumentojn. La pli malfrue alvenintaj kongresanoj ricevis la dokumentojn nur en la ĉefa Akceptejo. La dokumenta koverto estis riĉenhava: kongresinsigno, 30-paĝa kajero „Kongres-Sciigoj“, gvidlibro tra Breslau kaj diversaj aliaj utilaj presaĵoj estis en ĝi. Precipe la Kongres-Sciigoj estis modela faritaĵo de amiko Goho; ĝi enhavis ĉiujn ĝeneralajn informojn pri la kongreso, kompletan programon, liston de la kongresanoj, kantajtekstojn ktp. kaj faris vere bonan impreson.

Speciale menciinda estas la granda kaj lerte aranĝita ekspozicio, pri kiu ankaŭ s-ro Habellok havis la respondecon. Apud ĝi troviĝis stando de la librovendejo Schuberts Sortiment, kies posedantoj gefratoj Kirchner estas esperantistoj kaj multe klopodas

pri la disvastigo de nia lingvo en Breslau. Sajnas, ke la librejo bone negocis en la kongresejo.

* * *

La liberan antaŭtagmezon de sabato ni uzis en malgranda rondo por travagi la stratojn de Breslau kaj iom rigardi ĝiajn vidindaĵojn eksterajn. Ĉe tio ni vidis en la granda magazeno Gebr. Barasch vere bele aranĝitan montrofenestron por la propagando de Esperanto. Ĝian efikecon pruvis la fakto, ke ĝi konstante estis „sieĝata“ de granda amaso da rigardantoj neesperantistaj. Nia promenado finiĝis en la fame konata malnova „Schweidnitzer Keller“ (restoracia kelo en la urbodomo), kie ni regaligis per bona tagmanĝo kaj ne malpli bona biero.

* * *

Posttagmeze avenis karavaneto el Berlin, pri kies alvojaĝo mia ŝatata kunlaboranto s-ro Gube raportas en aparta artikolo en ĉi tiu numero. Mi bone komprenas lian ĉagrenon pri tio, ke de la redakcio li ne ricevos la necesan vojaĝmonon por la XIVa Universala Kongreso. Sed kial li ne estas pli ŝparema? Li ricevas por sia kunlaborado tiel altan honorarion, ke ĝi, se li ne malŝparus ĝin, tute sufiĉus por la vojaĝo al Helsinki. Bedaŭrinde s-ro Gube ankaŭ en Breslau ne povis esti senlime feliĉa — aŭ ĉu tamen? —, ĉar lia kara edzino dum la tuta daŭro de l' kongreso devis kuŝi en lito pro la malsano, kun kiu ŝi venis al Breslau. Nu, mia sperta kunlaboranto ja kunvenigis „prokuriston“ kaj komunan amikinojn, kiuj helpis forigi lian doloron pri la neĉeesto de lia „pli bona duono“ en la kongresaj p'ezuroj.

* * *

En la *Akceptejo* la kongresa vivo plivigliĝis. Ĉiumomente alvenis novaj kongresanoj, kaj la deĵorantaj Lo-Ko-Ko-anoj havis multe da laboro. Entute anoncis sin pli ol 500 kongresanoj, inter ili pli ol 100 eksterlandanoj precipe german-bohemaj, sed oni „vidis multajn el ili, kiuj ne ĉeestis“. En flanka ĉambro de la Akceptejo troviĝis la sidejo de la Lo-Ko-Ko. En ĝi staris ŝranko entenanta sekretajon, pri kiu amiko Goho jam de unu jaro atentigis min. Ĉu estas mirigi, ke mi klopodis esplori la sekreton? Kaj mi sukcesis, trovante botelon da bongusta „kremo“, laŭdire miljara! La altirforto de tiu botelo kun sia enhavo estis tiel granda, ke mi, estante en la Akceptejo, neniam povis preterlasi viziton al la ŝranko, por almenaŭ — rigardi la botelon.

Dum la kongreso

La kongresaj aranĝaĵoj komenciĝis sabaton per *salutvespero* kun riĉa „miksita“ programo

kaj salutparolado de s-ro Habellok. La troriceco de la programoj en la amuzaj vesperoj estas la sola afero, pri kiu oni povus riproĉi la kongresan komitaton. La plezurestro Habellok prezentis tro multe da „numeroj“; malpli de ili estus estintaj multe pli bone. Tion oni precipe sentis dum la salutvespero. Ĉi tia havas la celon, interkonigi la kongresanojn; malnovaj amikoj kaj konatoj salutu sin reciproke kaj rakontu unu al la alia siajn travivaĵojn dum la pasinta jaro; novaj ĉeestantoj serĉu kaj trouv interkonigon kaj interamikigon. Ĉi ĉio ne estas ebla, se dum la tuta vespero oni devas sidi ĉe la sama tablo, rigardante kaj aŭskultante longan — cetere tre bone elektitan — programon. Kiam ĝi finiĝis, estis noktmezo, kaj oni eĉ ne trovis tempon por fari la laŭpograman kantadon komunan. La plej multaj ĉeestantoj estis lacaj kaj iris dormi. Tiel okazis, ke en la salutvespero mi ja salutis malnovajn konatojn, kiuj ĉeestas ĉiujn germanajn kongresojn, sed ne renkontis tiujn novajn, kiujn mi serĉis kaj kiuj serĉis min. Nu, kara Goho, ne ĉagreniĝu pri mia kritiko; mi scias, ke vi havis la plej bonajn intencojn riĉate tion, kion vi volis prezenti al viaj gastoj. Mi ne malmulte bedaŭras, ke pro via multa laboro dum la kongresaj tagoj ni ne povis efektiviĝi la agrablan postkursidan programon, tiel bele elpensitan en la pasinta jaro en Dresden.

* * *

Dimanĉon (4. 6.) matene je la 8a okazis *Esperanta Diservo* en *Vinzenz-preĝejo*. Predikanto estis kaplano Dro Hotzelt el Bamberg, kiu faris belegan predikon.

Antaŭtagmeze je la 10a, post kunsido de l' konsilantaro, nia kara asocia prezidanto *Dro Steche* oficiale malfermis la kongreson en la granda, tute plena ĉambrego de l' kongresejo. Signifus „porti strigojn al Ateno“, se mi volus detale paroli pri la lerta maniero, en kiu nia prezidanto plenumis sian taskon. La neesperantistaj aŭskultantoj certe havis la impreson, ke afero, al kiu tiel konvinke parolanta viro dediĉas sian korpan forton kaj sian animon, ne estas malgravaĵo, kaj ĉi tiu sento esprimiĝis ankaŭ en la alparoladoj de la oficialaj reprezentantoj. Salutis la kongreson: ĉefurbestro *Dro Wagner*, preposto *Becker* (li transdonis la bondezirojn de ĉefepiskopo kardinalo Dro Bertram el Breslau), direktoro *Glück*, prezidanto de la Esperanto-Gruparo Berlin, kriminalĉefpolicano *Pohle* kiel oficiala reprezentanto de la policprezidanto de Dresden, kaplano Dro *Hotzelt* por la sudgermanaj esperantistoj, instruisto *Sohrmann* el Weinböhla en la nomo de la saksa instruistaro, *Dro Narita* kiel reprezentanto de la japanaj

samideanoj, prof. *Dro Schmidt* el Potsdam en la nomo de la germana akademiano, inĝeniero prof. *Scholze* el Reichenberg (Bohemujo) kiel reprezentanto de la tiea foir-oficejo. s-roj *Huber* el Salzburg kaj *Roger* el Graz komisiitaj de niaj german-aŭstriaĵ fratoj, s-ro *Hoffmeister* el Hamburg por la Nordalbinga Esperanto-Ligo, s-ro *Hurler* el Köln por la Rejnlanda-Vestfalia Esperanto-Ligo (Revelo) kaj s-ro *Freund* el Breslau kiel reprezentanto de U.E.A. Kiel oficialaj reprezentantoj el Breslau krome ĉeestis: jurkonsilanto *Dro Heilberg*, polica konsilanto *Höbig*, komisiita de la polica prezidanto, kaj poŝta konsilanto *Slotty*, komisiita de la prezidanto de l' supera poŝtdirekcio. Rimarkinde estas, ke la komercistaro ne sendis reprezentanton, kvankam ĝi estis invitita. Espereble la Breslau-aj komercistoj kaj industriistoj nun per la kongreso estas iomete konvinkitaj pri tio, ke Esperanto estas io, kio ĝuste koncernas ilin. — Alvenis ankaŭ multaj telegrafaj kaj leteraj bondeziroj, kiujn *Dro Steche* parte laŭtlegis antaŭ la fermo de l' kunsido.

* * *

Estis bona ideo de la kongresa komitato, aranĝi por ĉiu kongrestago *komunan tagmanĝon* en la kongresejo. Malpli bona estis la maniero, en kiu la restoracia mastro efektiviĝis la ideon. La plej multaj kongresanoj partoprenis nur la unuan tagmanĝon (dimanche); ĝi estis sufiĉe multekosta, la manĝaĵoj estis malbonaj, kaj ankoraŭ pli malbona estis la servado tiel, ke ekz. la tablo, ĉe kiu mi sidis, ricevis manĝaĵojn kaj trinkaĵojn nur ĉe la fino de la tuta tagmanĝo. Sed, ju pli malbone estis zorgate pri la korpa bonstato de la manĝantoj, des pli bone diversaj parolantoj zorgis pri la animstato de siaj kunuloj. Dank' al la humorplenaj paroloj baldaŭ ekestis vera bonhumoro. La plej bonan parolon faris mia kunlaboranto *Logo* (Gube) al la sinjorinoj. Lia diritaĵo estis tiel sprita kaj entuziasmiga, ke eĉ la gvidhundo de nia blinda samideano *Selten* el Breslau esprimis sian konsentan ĝojon per laŭta „vaŭ, vaŭ!“ post la tosto. Sed la gajeco atingis sian supron, kiam oni kantis la „respondon“ al la sinjoroj, t. e. festkantaĵo „al la apogantoj de la germana Esperanto-movado, dediĉita de la Breslau-aj Samideaninoj“. Ĝi estis verkita de f-ino *Julie Wolfson* kaj afable-satire prikantas kelkajn konatajn personojn kaj objektojn. Mi volonte publikigus ĝin ĉi tie en traduko; sed ĉi tiu bedaŭrinde ne estas farebla pro la germanaj vortludoj en ĉiu strofo. Kiu scipovas la germanan lingvon, bonvolu legi la versajon represitan en la nunmonata numero de Germana Esperantisto. Nur unu strofon concernantan mian „infanon“, mi volas citi en prozo:

La „kara“ suĉinfano de Eko
 Certe jam de longe havas la unuan denton;
 Ĉar de tempo al tempo mordema
 Ĝi montriĝas — se ĝi nur lasus al ni
 trankvilon!!

Jes, karaj Breslau-anoj, mia infano ne maltrankviligas vin per mordemo, ĉar ĝi ne havas kaŭzon por tio.

* * *

Posttagmeze okazis la *unua laborkunsido*. Laŭ la rajtigiloj transdonitaj al la estraro estis oficiala reprezentataj 57 grupoj de G.E.A. kun 117 voĉoj. La multaj aliaj ĉeestantoj estis neoficialaj partoprenantoj. S-ro *Ranft*, la sekretario de G.E.A., laŭtlegis la raporton pri la pasinta agadjararo. El ĝi evidentiĝis ĝojiga progreso de nia movado en Germanujo de post la antaŭjara kongreso en Essen. Germana Esperanto-Asocio nun ampleksas 171 grupojn (kun entute 4324 membroj) kaj 53 izolitulojn. La raporto estis unuanime akceptata sen diskuto, same la financa raporto farita de la kasisto *Dro Arnhold*. Starigo de etato por la nova agadjararo ne estis ebla pro la necertaj cirkonstancoj, en kiuj la ekonomia vivo de Germanujo nun troviĝas. Sekvis iom longedaŭra, parte malkonciza, sed parte ankaŭ vigla debato pri la nova regularo de G.E.A., proponita de la estraro. Dank' al la nesupereble lerta prezidado de *Dro Steche* la situacio fine klariĝis, kaj oni atingis kontentigan rezulton jen resumatan: La agadjararo de G.E.A. ne plu koincidos kun la kalendara jaro, sed komenciĝos la 1an de Aprilo. — La Lokaj Grupoj nun devas pagi al la Asocio jaran kotizaĵon de po 20 M por ĉiu membro, kaj la estraro de G.E.A. estas rajtigita, duonjare nove decidi pri eventualaj krompagoj. — La demando, ĉu junuloj malpli aĝaj ol 18 jaroj povas aliĝi al G.E.A. kaj ĉu ili eventuale pagu nur la duonan kotizaĵon, estis solvata laŭ tio, ke oni lasas al la grupoj la interrilatojn kun la junuloj. Krome oni elektis komitaton konsistantan el s-roj *Dro Dietterle* el Leipzig, instruisto *Stephan* el Neustadt (Supera Silezio), *Dro Arnhold* el Dresden kaj *Habellock* el Breslau; ĉi tiu komitato plue ekzamenu la supre diritan demandon. — La Lokaj Grupoj nun estas devigitaj, kuniĝi en regionaj ligoj, kaj oficialaj aranĝoj de la grupoj nun estas fareblaj nur kun interkonsento de la asocia estraro. — La konsilantaro de G.E.A. estas aliformita laŭ tio, ke de nun ĝi konsistas el 6 anoj elektitaj de la Asocio en la jara ĉefkunveno kaj krome el po 1 reprezentanto de ĉiu regiona ligo. — Laŭ propono de *Dro Dietterle* oni akceptis la novan regularon kun ĉiuj ŝanĝoj „en bloc“ kaj lasis al la estraro la redak-

tadon de la ŝanĝoj. La kompleta regularo estos publikigata en la aŭgusta numero de Germana Esperantisto.

* * *

La tago finiĝis per granda *festvespero*. Ankaŭ ĝi havis bonegan programon, sed mi devas ripeti pri ĝi la samon, kiun mi jam diris pri tiu de la salutvespero. Tro multe da prezentaĵoj lacigas la spiriton, kaj oni perdas la necesan atentemon precipe post okazo- kaj laboro-riĉa tago, kia estis la finiĝanta. Mi devas konfesi, ke mi atente aŭskultis nur la unuajn „numerojn“; poste mi estis pli multe en la antaŭĉambro por babilo, ol en la festĉambrego, kvankam mia edzino estis tre malkontenta pri mia malfideleco al ŝi. Mi aŭdis, ke al kelkaj Breslaueranoj la ampleksaj programoj eĉ ne sufiĉis! Tiuj nekontentemuloj verŝajne havas pli fortajn nervojn ol la plej multaj aliaj kongresanoj. Malgraŭ ĉio ni ne malatentu la grandegan laboron, kiun la aranĝintoj havis, por efektiviĝi tiajn programojn, kaj ni sincere danku ilin pro tio, ke ĉio funkciis tiel bone, kiel ili intencis tion. Amiko Goho diris al mi: „En la venontaj du jardekoj mi certe ne aranĝos novan kongreson!“ Tion mi povas kompreni, kaj mi ne envias la grandan kaj la malgrandan „Hoj“ pro ilia kongrespreparanta laborego. Sed mi admiras ilian organizaĵon talenton, per kiu ili atingis tion, ke ĉiu kongresano sentis sin hejme en Breslauerano.

* * *

London (5. 6.) antaŭtagmeze estis la *dua laborkunsido*. En ĝi oni pritraktis diversajn proponojn. La proponoj de la grupoj de Freiberg, Brand-Erbisdorf kaj Potsdam, celantaj la afiŝadon de propagandiloj por Esperanto kaj de oficialaj ordonoj en Esperanto en stacidomoj, poŝtejoj vagonaroj ktp., estis malakceptataj, ĉar ilia efektiviĝo pro diversaj kaŭzoj ankoraŭ ne estas ebla. — S-ro Sappl el Graz, „Esperanto-profesoro honoris causa“, estis proponinta, ke la kongreso faru decidon laŭ tio, ke la titolo „profesoro de Esperanto“ estu oficiale rekonata en Germanujo. La propono estis malakceptata kiel ne efektivebla, ĉar la titolo „profesoro“ en Germanujo estas alprenbla nur kun ministeria permeso. Do s-ro Sappl lasu sian ŝajne tre amatan titolon en eksterlando, kiam li revenos Germanujon. — La propono de la estraro, subteni la Centran Oficejon en Paris per kotizaĵo de po 2 M por ĉiu membro de la asociaj grupoj, estis akceptata. — Malakceptata estis la propono de Esperanto-Societo Dresden, kunigi la du gazetojn Germana Esperantisto kaj Esperanto-Praktiko, post kiam mi estis klariginta la motivojn de nia eldonejo por la plueldono de ambaŭ gazetoj. Oni

esprimis pri la enhavo de la gazetoj diversajn dezirojn, kiujn mi klopodos plenumi. En la nomo de la eldonejo kaj de la redakcioj mi ankaŭ ĉi tie kore dankas al s-ro Dro Steche. — Propono de la grupo Glashütte, ĉiuloke funkciigi jurigitajn ekspertojn por Esperanto, estis akceptata; la ekspertoj estos nomataj pere de Germana Esperanto-Instituto. — Prof. Dro Dietterle raportis iom detale kaj tre interese pri la laboroj kaj sukcesoj de la Esperanto-Instituto. Finante li petis la germanan esperantistaron pri ĝia subteno al la Instituto. Ĉi tiu peto naskis la proponon de s-ro Glück el Berlin, apogatan de s-ro Fricke el Bremen, ke de ĉiu vendita Esperanto-libro estu donata depago al la Instituto. La propono estis akceptata laŭ principo, sed por la plua ekzameno de la demando oni elektis komisionon konsistantan el la asocia estraro kaj s-roj Fricke el Bremen, Kötze el Leipzig kaj mi. S-ro Fricke krome proponis „imposton“ al la instituto por ĉiu kursano. Pri tio oni ne decidis, sed lasis al la bontrovo de la kursestroj la pagon de tia subteno. Fine s-ro Glück rekomendis, ke la grupoj estu devigataj, ĉiujare kolekti minimume 50 M por la Instituto kaj fondi unuigojn de patronoj de Esperanto.

Lastfine la grupo de *Plauen i. V.* invitis la venontjaran Germanan Esperanto-Kongreson al sia urbo; la invito estis unuanime kaj ĝoje akceptata.

* * *

Posttagmeze la kongresanoj estis gvidataj en tri grupoj al kaj tra la *vidindaĵoj* de la malnova kaj treege interesa urbo. La unua grupo, gvidata de universitata profesoro Dro Patzak, vizitis la Universitaton; la dua grupo estis gvidata de preposto Becker tra kelkaj preĝejoj kaj parto de la malnova urbo; al la tria grupo rektoro Driesler iom pli detale montris la vidindaĵojn de la malnova urboparto.

Kune kun nia asocia prezidanto, liaj edzino kaj filino, niaj geamikoj el Lübeck kaj Flensburg k. a. mia edzino kaj mi aliĝis al la dua grupo. Nia afabla kaj sperta gvidanto montris aŭ montrigis al ni tre detale la intern-on kaj -aĵojn de la majesta katedralo kaj de kvar aliaj preĝejoj, inter ili la Vinzenz-preĝejo, kies ĉefpastro s-ro preposto Becker estas. La rigardo al la riĉaĵoj kaj belajoj de la ŝanklejoj estis por ni vera ĝuo, pro kiu ni sulkdas sinceran dankon al nia ŝatata gvidinto. La postan promenadon tra malnovaj stratoj mi bedaŭrinde devis rezigni, ĉar miaj piedoj ne plu volis porti min. Kun mia edzino mi iris en vinrestoracion. Tie ni renkontis amikon Wallon, kaj kun li ni trinkis bovlon pro bona negoco, kiun li faris en Breslauerano.

* * *

La vespero revokis nin al la kongresejo, al dua *festvespero*, en kiu la Breslau-anoj prezentis al siaj gastoj silezian arton. En la unua kaj tria partoj ni aŭdis kantaĵojn de knabinaj horoj, kaj en la dua kaj kvara partoj grupanoj de Breslau ludis du unuaktaĵojn. Ĉio estis bone elektita kaj ne malpli bone prezentata, sed ankaŭ ĉi tiu aranĝo estis tro longedaŭra. Dum la lasta parto mia cerbo ne plu estis akceptkapabla; mia spirito strikis, kaj mi — estas hontigi, diri tion — ekdormis sur mia seĝo. Sed mi dormis senbruite kaj ne ĝenis la ĉirkaŭsindantojn per ronkado. — Post la prezentado sekvis dancado, kiun nek mia edzino nek mi ŝatis partopreni, ni preferis iri hejmen por dormi. La danc-kaj ali-emoj daŭrigis la vesperon ĝis la frua mateno. Kelkaj feliĉuloj eĉ gajnis ion — parte tre valorajn objektojn (solidajn kaj fluidajn!) — en aranĝita kongresloterio.

* * *

Mardon (6. 6.) antaŭtagmeze la diversaj *cakuloj* kunvenis, en la kongresejo en *spezialaj kunsidoj*. Ĉar mi ne emis imiti nian asocian prezidanton, kiu kvazaŭ partigis sin kaj ĉeestis kelkajn el tiuj kunsidoj, mi vizitis nur la kunsidon de la komercistoj. En ĝi s-ro Ranft el Dresden detale raportis pri la agado de la Komercista Grupo en sia urbo. Plue oni pritraktis diversajn aranĝojn utiligeblajn por la per-esperanta propagando inter la komercistoj kaj industriistoj. Guste al ĉi tiuj rondoj ni energie devas evidentigi la bezonecon de nia helpa lingvo, ĉar posedante la komercistaron, Esperanto posedas la mondon.

* * *

Posttagmeze okazis vizito al la fame konata *jarcenta halo* kun ĝia kolosa orgeno, la plej granda de la mondo. Antaŭ la halo oni faris la neeviteblan kongres-fotografajon. Mi volis enpresii la bildon kiel ilustraĵon por mia raporto, sed pro la necesa plimalgrandigo oni ne estus rekoninta la fotografitajn personojn, sed nur la fasadon de la granda halo. La interno de la halo estas vere grandioza, kaj ankoraŭ pli grandioza estis la efiko de la ludata orgeno al ni. La lerta orgenisto ludis i. a. improvizitan fantazion pri la Esperanta Himno kaj preĝejan kanton. Guste kiam ni estis edifataj per la muĝantaj sonoj, eniris la halon du monaĥoj. Per si mem tio ne estas io rimarkinda, sed ĝi fariĝis tia per la cirkonstancoj en tiu momento. Imagu: Nia kara larĝa maso el Lübeck certe havas jam tre konsiderindan korpvolumenon; sed unu el la monaĥoj estis minimume duoble pli dika ol nia amiko, kaj la alia ne estis multe pli maldika. Ĉu estas mirige, ke la intern-

ĝintaj aŭskultantoj per ĉi tiu aferaĵo estis tirataj el sia edifeco kaj el altaj sferoj ridante revenis al la reala mondo?

Post la koncerto ni trinkis tason da kafe en belega ĝardeno apud la jarcenta halo, kaj poste ni devis rapidi al la kongresejo, kie okazis la *ferma kunsido*. En ĝi Dro Steche donis resumon pri la irado de la kongreso, pri la laboroj faritaj dum ĝi kaj pri ĝiaj rezultatoj. Li akcentis — tion li povis fari senskrupule —, ke en la debatoj de la kunsidoj montrigis ĝojiga konfido al la asocia estraro, kaj s-ro Gube konfirmis tion per entuziasmaj vortoj, esprimante la dankon de la kongresanoj al la estraro, precipe al ĝia prezidanto.

* * *

La vespero estis dediĉita al la propagando por Esperanto, kiun *Dro Steche* faris en la granda ĉambrego de l' kongresejo per *publika parolado* pri la temo „El la duonoficiala epoko de Esperanto“. En sia elokventa maniero la oratoro montris al la aŭskultantoj la nunan staton de nia movado, la pli kaj pli fortan enpenetron de Esperanto en lernejojn, oficialajn instituciojn kaj la praktikan vivon, tiel ke ni nun jam rapide alproksimiĝas al la oficiala epoko de nia lingvo. Al la longedaŭre aplaŭdita parolado sekvis mallonga diskuto.

La propaganda vespero estis la fino de la kongresa programo en Breslau, kiu en la sekvontaj tagoj estis daŭrigata en tri ekskursoj: al Fürstenstein, al Zobten kaj al Riesengebirge. Resume oni povas diri, ke la 11-a Germana Esperanto-Kongreso bonege sukcesis en ĉiu rilato, dank' al la celkonscia preparado de la aranĝintoj kaj dank' al la lerta prezidanto de la estraro de G.E.A. Espereble la venonta kongreso en Plauen i.V. fariĝos same bona.

Ĉirkaŭ la kongreso

Estas tute kompreneble, ke la kongresanoj ne kontentiĝis pri daŭra restado en la kongresejo, sed ke ili deziris koniĝi kun la vivo de Breslau ankaŭ en aliaj ejoj de la urbo. Tre agrablaj estis la manĝoj, kiujn mi partoprenis en gaja rondo en la restoracio Kießling kaj en Schweidnitzer Keller. En tiu rondo kuniĝis malnovaj konatoj, fervoraj batalantoj por Esperanto kaj miaj plej bonaj kunlaborantoj. Estis societo de gegajuloj, kiuj scias ŝerci unu al la alia, ne ofendiĝante eĉ pri mokserco. Unuvorte: ĉi komprenis sin reciproke.

Post la vesperaj prezentadoj nia rondo vizitis kelkajn restoraciojn — kiom ankoraŭ restis tempo por tio ĝis la polica horo — kaj amuzis sin en sia maniero. Pli granda la rondo estis iun vesperon en iu restoracio de „onklo Willi“. Tie mi havis la feliĉon,

esti kisata de iu „feliĉo“; sed mi ne povas diri, ke tiu kiso estis io aparta . . . Detalojn pri tiaj amuzaj kunvenoj ni ne plu rakontos. Kial ne? Nu, ĉar mi eksciis, ke kelkaj eksterlandanoj, ne komprenante la veran germanan „Gemütlichkeit“, „ŝokiĝis“ pri miaj antaŭjaraj rakontoj el Essen kaj suspektis unu el niaj plej eminentaj samideanoj pri mallaboremo kaj diboĉemo. Ion tian mi ne denove volas ekestigi, kaj pro tio mi preferas silenti pri tiuj tute neriproĉindaj kunsidoj.

Speciale agrable estis por mia edzino kaj mi la tagmanĝo, kiun ni ĝuis en la lasta kongresa tago en la hejmo de samideano prepostoj Becker kaj lia afabla fratino kune kun Dro Hotzelt el Bamberg kaj unu el la fratoj Fethke el Bromberg (pole Bydgoszcz).

Post la kongreso

Merkredo (7. 6.). „He, Ekino, rapide ellitiĝu! Jam estas la 5a kaj duono, kaj je la sesa kaj kvarono forveturos la vagonaro al Zobten! Mi ne ĝustatempe vekigiĝis!“

Forte skuante mian ankoraŭ profunde dormantan edzinon, mi preskaŭ tiris ŝin el la lito kaj tiamaniere atingis ŝian tujan vekigon, kiun ŝi kutime ne ŝatas.

Ni estis decidintaj, partopreni la unutagan ekskurson al la monto *Zobten*, kvankam ni eble intencis kunmigri tra Riesengebirge. Sed ĉi tiu ekskurso daŭris kvar tagojn (anstataŭ du, kiel mi supozis), kaj ĉar krom la kongresado mi havas ankoraŭ alian okupon, mi ne povis forresti de ĉi tiu tiel longtempe.

Do ni rapidege vestis nin kaj kuris al la haltejo de la tramveturilo. Se ĉi tiu tuĵ estus veninta, ni eble estus atingintaj la vagonaron; sed ni devis atendi kelkan tempon, kaj kiam ni fine sidis en la veturilo, ĝi veturis terure malrapide. Du minutojn tro malfrue ni venis al la stacidomo. Antaŭ la biletkontrolero atendis nin f-ino Wolfson, kaj transdonis al ni niajn biletojn, kiujn Dro Möbusz jam estis aĉetinta por ni. La sekvonta vagonaro veturis nur post kvar horoj. Do ni reveturis hejmen, dormis horeton kaj — preskaŭ estus maltrafintaj ankaŭ la duan vagonaron, ĉar ni veturis alian, pli longan vojon al la stacidomo.

Alveninte en Zobten mi ĉirkaŭrigardis, ĉu la ĉefekskursantaro eble postlasis iun signon, el kiu ni povus informiĝi pri renkontejo sur la monto. Bedaŭrinde mi ne trovis ion tian; niaj malfidelaj amikoj eble ĝojis pri tio, ke ili estis liberigitaj de ni, kaj ne volis nin postvenigi al si. „Nu, ili ne tro frue ĝoju, ni scios trovi ilin“, mi diris al Ekino. Apenaŭ dirinte tion, mi ekvidis sur la strato antaŭ la stacio samideano Jahn el Dresden. „Tio estas bonega, nun ni ne estas tute solaj!“ mi diris al li post intersaluto, kaj li reciprokis la samon al ni. Do ni kune ekmarŝis al la

supro de la monto Zobten, alta 718 metrojn. Estis varmege. Tamen mi vigle antaŭenpaŝis, por atingi la celon diritan, nome la karavanon. Estis vera feliĉo, ke ni renkontis s-ron Jahn; en la suprenirado li estis same malforta kiel mia edzino tiel, ke ĉi tiu havis akompananton kaj ne bezonis konstante revoki min de mia antaŭmarŝo. Dumvoje mi renkontis malsuprenirantajn samideanojn, kiuj diris, ke la aliaj, t. e. la ĉefkaravano, ankoraŭ estis sur la supro, kiam ili foriris. Do mi duobligis mian suprenirrapidecon. Sed kiam mi atingis la supron, mi ja vidis multajn homojn, sed ne niajn amikojn. Do, denove mi alvenis tro malfrue. Nu, ankoraŭ ne estis vespero, kaj mi ne perdis la esperon. Kiam mi jam estis tagmanĝinta mian buterpanon, alvenis miaj postgigintoj. Post horo da ripozo ni rigardis la unike belan perspektivon de sur la turo de kapelo staranta sur la supro de l' monto kaj poste ekiris malsupren en alia direkto. Ĉi tiu vojo estis tre kruda kaj malfacile surirebla. Ni devis transrampi grandan ŝtonkampon, en kiu tute ne ekzistis vojo. Nur instinkte ni antaŭeniĝis, kaj nia bona spirito fine kondukis nin sur la ĝustan vojon al Rosaliental, nia celo. Tamen estis tre interesa kaj belaga migrado, precipe tra la malnova arbaro sur la malsupra parto de la monto. Kiam ni alproksimiĝis nin al nia celo, jam estis malfrua posttagmezo. „Ĉu ni nun renkontos la karavanon?“ ni demandis unu la alian, malsuprenirante la lastan dekliveton al la restoracia ĝardeno. „Jes, efektive, tie ili estas!“ Ekino kriis, montrante al longa tablo. Ni estis akceptataj per laŭta ĝojkriado, el kiu mi konkludis, ke la ĝojo pri la revido ankaŭ de tiu flanko estis sincera. Do, pardonu mian unuan suspekton, karaj geamikoj! La karavano estis irinta la saman vojon kiel ni, nur ke ĝi havis en samideano Zuckschwerdt el Schweidnitz gvidanton, kiu pro sia plezuro pelis la ekskursanojn jen tien jen tien sur la granda ŝtonkampo, tra riveretejoj, trans rokerojn ktp. Li eĉ estis tiel senhonta, ke li kvazaŭ perforte devigis la ekskursanojn, atesti sur poŝtkarto al lia edzino lian bonegan gvidadon! Mi povas imagi la plezuron, kiun li havis, vidante rampi supren kaj malsupren „sur ĉiuj kvaroj“ la larĝan ŝvitegantatan mason de Dro Möbusz kaj la delikatajn sinjorinojn. Tamen neniu koleris pri li, ĉar ankaŭ por la gvidatoj la sufero estis plezuro.

En gaja rondo ni ankoraŭ kune sidis ĝis la vespero. Tiam ni reveturis Breslau-on kaj, alveninte tie, disiĝis kun unu ridanta okulo (pro la bela tago pasinta) kaj kun unu ploranta okulo (pro la horo de l' disiĝo). „Ĝis la revido en Plauen i V.!“ estis la lasta parolo, kiun ni eldiris unu al la alia. Kaj

en ĉi tiu espero ni daŭrigu por plua jaro nian laboron por nia granda afero, kiu nun tiel bone progresas!

* * *

De sur Schneekoppe en *Riesengebirge* mi ricevis poŝtkarton de amiko Goho kaj lia gvidataro, ke ankaŭ tiu ekskurso estis belega kaj amuza. Tion mi kredas, kaj mi tre bedaŭras, ke mi ne povis partopreni ĝin pro la supre dirita kaŭzo. Mia edzino ankoraŭ pli multe bedaŭras tion, ĉar ĝuste ŝi estis trege ĝojinta pri la bona okazo, konatiĝi kun unu el la plej belaj montaroj germanaj. Iom pli detalan raporton pri tiu ekskurso mi ne ricevis. Eble ankoraŭ alvenos iu por publikigo.

Pri la unutaga ekskurso al Fürstenstein, kiun i. a. partoprenis Dro Steche kun sia familio, mi ne eksciis ion.

* * *

Ĵaŭdon (8. 6.) posttagmeze mi disiĝis ankaŭ de mia edzino, kiu reveturis Berlinon, dum ke mi kune kun samideano Jahn reveturis al mi provizora restadejo Dresden. Tiel finiĝis por mi la germana kongresa vojaĝo nunjara. Ĝi relasis en mi tre agrablajn rememorojn!

F. Ellersiek

Al Breslau!

„Tre ŝatata sinjoro kunlaboranto! La kostojn de vojaĝo via al Helsinko mi ne povas pagi por vi. Mi ja enspezas grandegajn sumojn per mia eldonejo —“ (li nun havas eĉ du), „sed mi bezonas tiom multe da mono, por konservi mian personon, tiel gravan por la Esperantanaro, ke mi ktp. Sed se vi volas vojaĝi al la germana kongreso, volonte mi ktp.“ Tiel skribis Li!).

Mi disprenis larmon en mia — ne nur laŭdire — bela okulo. Mortis Helsinko, vivu Breslau! Al mia amiko Curt Rauh en Foche, membro de mia Friedenau-a grupo, mi skribis: Li ne volas. Respondo: „Vi estas rano, dependigante vian vojaĝon al Finnlando de la „kapricio“ — tiel skribis ti, ne mi — de „iu“ (tiel li, ne mi) ĉefredaktoro. Do ni vojaĝos kune kun Nora al Breslau.“ Nora estas nia komuna amikino. Sed, kara leganto, kion vi pensas? Mi diris: amikino. Triangulaj rilatoj? Mi tre petas Mi estas edzo, tute fidela edzo, kaj Nora? Nora estas la juna amikino de mia edzino, de Curt Rauh kaj mi. Ĉi tie regas ordo!

Gruparo en Berlin! La prezidanto (germane parolante): „Do mi diras, ke estas nia spika devo, viziti multnombraj la kon-

greson en Breslau.“ Ĉu spika? Jes! Ĉu vi opinias, ke tio estas manko de elparolado, — ke lia ŝatata prezidanta Moŝto eble interŝanĝis „spiko“ kaj „honoro“, ĉar li estas aŭstro? Tute erare diveninta! Esperanto estas la vasta grenkampo, kaj ni, la unuopaj Esperantanoj, ni estas la spikoj. — Pli ol tridek „spikaj“ manoj altiĝis; se mi ne eraras, ankaŭ tiuj de s-roj Schwaiger kaj Georg Mahn. Pli ol tridek! Kaj poste? Mi opinias, ke 11 ĉefurbanoj estis en Breslau, — ne s-ro Schwaiger, ne s-ro Mahn, al kiu Breslau ja ŝaldas tiom multe.

Hejme! Edzineto, ni ne veturos al Helsinko. „Li“ „formansignis“²⁾. Ŝi iomete koleteritis, sed poste: Do, al Breslau!

Al Breslau! De post la momento, kiam mi ricevis la leteron de mia ĉefredaktoro, laŭmerite tiel atestimata de mi, nur korpe ankoraŭ mi estis en Berlin. Mia animo estis en la 11a Germana. Precipe kiam mi rigardis en la okulojn de nia kara gruparsekretario, mia grupano, en kiuj mi ĉiam legis la rebilon de mia propra aŭtaŭĝojo. „S-ro Gube, en Breslau ni estos gajaj, ĉu ne?“ Ho jes, ni -os!³⁾

Sed ĉu ne ĉiam estas tiel en nia homa vivo, ke afero malprosperas, se ni tro mul' e ĝojas⁴⁾ pri ĝi? Ĉu la ĉefredaktoro malplenumis sian promeson, la ĉefo, pro kiu mi jam nun komencis la migradon de animo kaj „raniĝis“? Ho ne, mia ĉefredaktoro ne estas kapabla pri tia krimo. Li ĉiam plenumas, kion li promesis. Kiam li diras, vi ricevos ankoraŭ multe pli da laboro, mi povas esti certa, ke li efektive sendos ĝin. Ne, „Li“ ne kulpis. Sed, aŭskultu —! Du tagojn aŭtaŭ nia forvojaĝo „mia pli hela duono“ malsaniĝis tre grave je koliko pro ŝtonetoj en la galo. Miaj esperoj disfalis kvazaŭ luddarta konstruaĵeto. La kuracisto: Eventuale mi permesos la vojaĝon, kondiĉe ke ŝi estos tuj kuracata en Breslau de tiea profesoro universitata. Ĉion mi promesis. Kaj ŝin mi petis: plej kara, plej bona, plej ĉarma, nur baldaŭ, baldaŭge pliboniĝu! Kaj ŝi pliboniĝis. Ŝi ja ne povis paki niajn vojaĝaĵojn, tion devis fari la „komuna“ amikino Nora, ĉar mi mem devis labori ĝis la lasta momento, kompreneble por nia Ĝgazeto; ŝi ne povis iri sola al la haltejo de la tramvojo en Friedenau, tiel ke onko Willy preskaŭ portis ŝin, sed ŝi „kuneŝiris sin“, kiel decas al la edzino de malnova militsoldato, kaj estis ĝustatempe en la stacidomo kun Nora kaj mi. Tre brava ekfaro, pro kiu mi estas dankema al ŝi ankoraŭ hodiaŭ.

Ŝajne ni estis la unuaj Esperantanoj en la stacidomo. Sed jen — mi aŭdis la voĉon

¹⁾ Ne „Lui“, kio estas titolo de libro, ĉiam verkita de iu franco pri imperiestro Wilhelm II, sed „Li“, t. e. mia atestimata ĉefredaktoro.

²⁾ Tial mi provas traduki la germanismon „abwinken“.

³⁾ Germanismo: Germano: wir werden.

⁴⁾ Tion tradukos germana verkistino, tre ŝatata precipe de sinjorinoj, per „sich überfreuen“.

de mia „kongresnevino“ f-ino Nickel post mi. Baldaŭ aperis ankaŭ s-ro Blankenheim, la prezidanto de la ekfloranta Steglitz-a grupo, kiu tre komplezeme estis aĉetinta por ni ĉiuj la veturbiletojn. Sur la perono aligis sin al ni Curt Rauh, surprizante per sia apero miajn sinjorinojn kaj alveninte rekte el Rejnlando, nur por kuneesti kun ni dum la Breslau-aj tagoj. Jen amikaĵo! Ankaŭ la fervoraj „gerektojoj“ Helmholtz el Potsdam vidiĝis. Kaj nun — ĉiuj ĉapeloj de ni viroj malleviĝis teren ĝis la asfalta pavimo — la prezidanto de Gruparo s-ro direktoro Glück. Ne granda li estas, sed eminenta; ne fanfaronema, sed laborema; ne regema, sed afabla kaj modesta.⁵⁾ Oni sidigis mian edzinon en fenestran angulon, kaj la vagonaro ekforveturis. En „Schlesischer Bahnhof“ aligis sin ankoraŭ mia grupano Steinbrenner kaj s-ro Wichert, la unua sekretari odè Gruparo kun la neevitebla mapo de aktoj. Kiu vidis s-ron W. sen aktaro? Neniu! Do! La pezo de la skribaktoj presajaĵoj estis tiom granda, ke li devis hejme lasi eĉ sian matenmanĝon kaj esti nutrata el niaj provizoj, por ke li ne mortu je malsato ĝis Breslau.

Fine ni definitive forlasis la bruon Berlinon. Notindaj estas nur unuopaj okazaĵoj dum la veturo. En ĉiu iom granda stacio, kie la vagonaro haltis sufiĉe longtempe por lia celo, s-ano Blankenheim provis ĉiujn fervojoĉicistojn, la volantajn kaj la kontraŭstarantajn, por propagandmaterialo por tiaj personoj, kaj ĉiam li revenis al ni fiere kaj feliĉe, esperante, ke la abunde disĵetita semo havos iun frukton. Ĉu? Mi ne scias. Sed mi ne mirus, se dum eventuala venonta vojaĝo al Breslau, ĉiuj oficistoj nur alparolus nin Esperante. Ĉiuj — eĉ la gardistinoj de la plej sekretaj loketoj; ĉar mi ne povas supozi, ke s-ro Fervorulo forĝis ilin en la disdonaĵo. — Post la komuna matenmanĝo s-ro Wichert — versaĵne pro danko por nia nutrado — faris atakon kontraŭ ni. Seriozmiene li elmapigis valorajn aktaĵojn, legis el ili, klarigis, persvadis, konvinkis — pri kia temo? Se vi demandas, vi ne estas Gruparano. Alie vi sciuis, ke nur povis esti la afero pri regularo — tiu de G. E. A. Laŭ mia iom malbona memoro la intereso ne estis ĉie samgrada. Unu post la alia eliris el la kupeo, certe nur, ĉar oni iel bezonis lin ekstere. Nur s-ro Glück restis kaj — mia malsano edzino, tamen ne aŭskultanta. — La tria okazaĵo povus havi la plej terurajn konsekvencojn. Estis afero, kiu povus esti fariĝinta por ni ĉiuj treege danĝeriga. Ĉu vi kredos? Kredos, ke io tia povas

okazi al senruzaj Esperantanoj? Estis — bombatenco, bombatenco kontraŭ ni, la ĉie, ĉiel, ĉiam pacemaj Zamenhof-anoj. Ankoraŭ nun ekstremo skuas mian klakantan ostaron, kiam mi memoras pri ĝi. Feliĉa hazardo, ke ni ĉiuj konservis vivon. Kaj kiu estis la ĵetinto? Vi ne kredos, kaj tamen estas vero: la Esperantanema prezidanto de Gruparo Berlin. En Liegnitz li eliris, aĉetis veran Liegnitz-an bombon⁶⁾, revenis kaj ĵetis — ĵetis tiel lerte, ke sur ĉiun el ni falis unu peceto — sur mian kompatindan edzinon dupecetoj de lia projektilo. Malgraŭ la certeco de lia trafo ni tamen restis sendifektaj, eĉ niaj stomakoj.

Rapide ni alproksimiĝis al Breslau. Nia nervostreĉiĝo plialtiĝis. Nun ni baldaŭ estos en la Xla, nun ni reekvidos la malnovajn konatojn kaj amikojn. Kiuj ĉeestos? Ĉu li, ĉu ŝi? La okuloj havas pli radian brilon. Nun la vagonaro enuliĝas en la stacidomon de la kongresurbo. Jen la unua Esperantostandardo! Nj restas starantaj sur la perono. Kial? Ĉu prezidanto Glück atendas „spikajn“ virgulinon, triumfarkon, alparolon de la urbestro? Nenio tia! Ni ekridas kaj eliras. Jen — malgrandaj sovaĝuloj, — ne, Breslau-aj lernejoj sin ĵetegas sur niajn kofrojn, por ilin porti, iliaj okuloj radias, sur iliaj brustoj la verda stelo brilas; ni volas helpi la portantojn, ili ne permesas — bonegaj knaboj! En la Esperanto-oficejo stacidoma beleta kaj tre komplezema samideanino — —, sed —! Mi jam aŭdas vian voĉon, sinjoro ĉefredaktoro, krian: haltu! Mi ja scias, sinjoro, mia tasko temas „Al Breslau“, sed ne „Pri Breslau“. Pri ĉi tiu skribos pli kompetentaj plumoj. Pro tio mi devas adiaŭi, kara leganto, ĝis kiam mi priskribos mian veturon al Plauen en la venonta jaro, — eĉ ne menciinte la ĉarman historieton pri „la malgranda grifo“.

Berlin-Friedenau, nuntempe Bad Kissingen.

Ludwig Gube

Grava Sciigo

La karavano Lübeck-Helsinki ne okazos, tamen la antaŭkongreso.

Nia projekto, aranĝi karavano al Helsinki laŭ modestaj prezoj kaj tiel subteni la Universalan Kongreson, malsukcesis pro la indiferenteco kaj prokrastemo de la Esperantistoj. Ĝis la mezo de Junio, ĝis kiam ni devis pagi al la ŝipkompanio garantian sumon de 500 000 M, aligis nur 12 (dekdu!) kongresanoj. Tial la ŝipkompanio ekŝiĝis el la kontrakto kun ni. Pro tiaj malbonaj ŝancoj (ĝis fino de Junio la nombro de la aliĝintoj

⁵⁾ Pro sia kizado (ho!) en Breslau li ricevis la nomon Küssling = kismulo. (Küssling, karaj Breslauaj samideanoj!). Li ne kulpas pri tiu pasio, li ja estas sudlandano.

⁶⁾ Klarigo por ne-germano: Liegnitz-a bombo estas tre bongusta mielkuko.

altiĝis nur ĝis 23 kaj kelkaj necertaj promesoj) neniu alia ŝipkompanio estas trovebla, kiu sendos Esperantistan ŝipon al Helsinki laŭ niaj proponoj. Do ni ĉesigos nian laboron en ĉi tiu direkto. Tamen ni helpos al ĉiuj kongresanoj, kiuj uzos la regulajn Finnajn vaporŝipojn elirantajn el Lübeck aŭ Stettin. Por la aliĝintoj al nia misukcesinta karavano ni jam luis lokojn sur la nomitaj ŝipoj. Ankaŭ por la plie venontaj ni zorgos.

La programo de la antaŭkongresoj en Hamburgo kaj Lübeck ne estos tuŝata per la misukceso de la karavano, ĉar ja la plej multaj kongresanoj, vojaĝantaj al Helsinki, devas travojaĝi tiujn urbojn. Tial la gesamideoj, kiuj ne havas sufiĉe da mono, por viziti la Universalan Kongreson en Helsinki, trovas ĉe ni riĉan internacian vivon en samideana rondo. Ĝis nun aliĝis krom Germanoj: Angloj, Aŭstrianoj, Belgoj, Bulgaroj, Ĉeĥoj, Danoj, Francoj, Holandanoj, Hungaroj, Poloj, Rumanoj, Skotoj kaj Svisoj.

La vojaĝontoj al la Universala Kongreso foriros el Lübeck laŭ deziro: a) per la ŝipo „Mira“ la 5an de Aŭgusto je la 2a pt.; b) la 5an matene 9,26 per vagonaro al Stettin, tie uzante la ŝipon „Rügen“ je la 4a pt.; c) la 5an matene 9,42 per vagonaro tra Sassnitz-Trelleborg al Stockholm, tie uzante la 6an je la 7a vesp. la ŝipon „Birger Jarl“; d) la 4an vesp. 7,28 per vagonaro al Kiel, tie uzante la ŝipojn „Arcturus“ aŭ „Astraea“ la 5an matene. Ĉiuj ŝipoj alvenos ĝustatempe en Helsinki. Detalajn informojn donas nia komitato, kiu ankaŭ peras biletojn por la vagonaroj kaj ŝipoj. Al demandoj aldonu monbiletojn por la respondo!

D.o. A. Möbusz, Lübeck.

Postkongresa vizito en Kopenhago la 21an kaj 22an de Aŭgusto 1922

Certe multaj samideanoj, kiuj preterpasos Kopenhagon post la vizito ĉe la universala kongreso en Finnlando, volos uzi la okazon, resti en la dana ĉefurbo dum kelkaj tagoj.

Tial „Centra Dana Esperantista Ligo“ aranĝos en Kopenhago, la 21an kaj 22an de Aŭgusto, dutagan kuneston kun la enlandaj kaj eksterlandaj samideanoj, kiuj partoprenis la Helsingfors-an (9. — 16. Aŭg.) kaj la Stockholmlan (18. — 19. Aŭg.) kongresojn.

La kongreskarto, havebla ĉe F-ino Astrid Rybo, Kommuneskolen ved Sundholm, Kopenhago, S., kostas: 5 dan. kr. por svedoj, norvegoj, danoj, svisoj, francoj, belgoj, britaj imperianoj, holandanoj, hispanoj, italoj kaj usonanoj;

2 dan. kr. por finnoj, germanoj, litovoj, ĉeĥoslovakoj, rumanoj, bulgaroj, grekoj kaj jugoslavoj;

1 dan. kr. por estonoj, poloj, aŭstroj, hungaroj kaj latvoj

Bonvolu sendi la kotizon per ĉeko.

PROGRAMO

Provizore estas fiksita la jena programo:

Lundon (la 21an de Aŭgusto)

Antaŭtagmeze renkontiĝo ĉe *Langelinie*, unu el la plej belaj promenejoj en Eŭropo, laŭlonge de „la sundo“; en la konata restoracio ĉe la maro oni matenmanĝos, ĝuante la bonan danan buterpanon.

Poste (eble per aŭtomobila karavano) oni rigardos la urbon, la ĉefstratojn kaj iliajn konstruaĵojn, ekzemple la urbdomon, la rondan turon, diversajn palacojn, la borson, la reĝan teatron ktp.

Vespere komuna manĝado kun sekvantaj amuzajoj kaj dancado.

Mardon (la 22an de Aŭgusto)

Tagmeze *ekskurso al la banloko „Skodsborg“*, proksime de Kopenhago, kie oni pasigos kelkajn horojn en la fagarbaro kaj ĉe la marbordo.

Vespere la kongresanoj kolektiĝos en la muzejo „*Tivoli*“ kiu estas mondfama, eĉ unika establaĵo; kaj tial ne sen kaŭzo skribis Barono de Ménéil en „*La Revuo*“ 1908: „La famo de tiu ĝardeno ne estas trograndigita; ĉio, kio povas amuzi la homojn, sin trovas en tiu agrabla loko...“

Jes, estas vero, ĉar troviĝas tie: Grandega simfoniorkestro, teatroj kaj revuoj, bonegaj restoracioj, glitfervojo sur artaj rokoj, ĉiuspecaj popolaj amuzajoj, superbaj artfajraĵoj, grandiozaj iluminacioj ktp.

La tuta Kopenhago sen diversigo de rango renkontiĝas dum la vespero en „*Tivoli*“, kiu ĉe siaj grandaj festoj povas kalkuli ĉ. 50000 gastojn.

Kopenhago, kiun oni nomas „La urbo kun la belaj turoj“, estas konata kiel ĝojiga kaj belaspekta urbo.

Ĝi estas sufiĉe malnova, sed la plej multaj kvartaloj estas nun renovigitaj, tiel ke oni ne bezonas timi, ke ne regas en la „*Norda Atheno*“ la pureco de la „malnovaj Grekoj“.

Do, karaj samideanoj, venu multnombre al nia modesta kongreso, por kies sukceso ni Kopenhagaj Esperantistoj faros nian plejeblan.

Martin Blicher

Astrid Rybo

Prezidanto de Membro de la loka kongresa
Centra Dana Esperantista Ligo komitato de C. D. E. L.

Akademia Fako pri Konkursoj kaj Premioj

„Dum la vintro 1921 — 22 la Akademio ne okupis sin pri premiado, ĉar ĝi ricevis nur unu verkon por ekzameno kaj eventuala rekompenco. La kaŭzo estas sendube, ke

nek aŭtoroj, nek eldonistoj sufiĉe informiĝis pri la Regularo. Utile estas do, ĝin denove publikigi kaj konigi al la Esperantista publiko.

Por eviti senutilan elspezon al aŭtoroj kaj eldonistoj, — la rekompenco estas nur honora — la sendado de la libroj estu farata jenamane: Kun la prezento oni sendu:

1 ekzempleron al la Prezidanto de la Akademio, Prof. Th. Cart, 12, rue Soufflot, Paris;

1 ekzempleron al la Direktoro por Konkursoj kaj Premioj, Dro E. Privat, 2, Chemin de Roches, Genève.

Dro Edmund Privat.*

Regularo pri verkoj rekompencotaj de la Akademio

1. La Akademio rekompencas ĉiujare kelkajn verkojn rimarkindajn laŭ stila rilato.

2. La nombro de la kronitaj verkoj ne superos kvin (5).

3. Oni rajtas proponi por la rekompenco tradukojn, sed originalaĵoj estas preferataj de la Akademio.

4. La prezentataj verkoj devas esti publikigitaj en la lasta jardeko.

5. Nur libroj, kia ajn estas ilia amplekso, aparte eldonitaj, sekve ne gazetaj artikoloj, nek manuskriptoj, estas prezentebaj.

6. Verkoj de Akademianoj ne estas rekompencebaj.

7. La rajto de prezento estas rezervita al la membroj de la L. Ko., kiuj rajtas proponi ĉiu po du verkoj, kun konsento de la aŭtoroj.

8. La proponoj, montrantaj tre klare kaj precize la titolon de la verkoj, la eldonejon kaj la daton de la unua apero, devas esti sendataj al la Centra Oficejo (51, rue de Clichy, Paris) antaŭ la 1a de Marto...

9. Akademio komisiis elektos, post la legado de ĉiuj proponitaj verkoj, la dek plej bonajn.

10. La plena Akademio, post raporto de la komisiio, elektos la kvin rekompencotojn.

Lingvaj demandoj

Lingvaj notoj*)

de Walter Lippmann

3. Pri la vorto „unu“

„La (fundamentaj aŭ kardinalaj) numeraloj estas nedeklinacieblaj.“ Efektive! Vidu § 4 de la Fundamenta Gramatiko. Sed — se iu vorto ne estas numeralo, ni ne bezonas apliki tiun regulon.

Kial Dro Zamenhof faris la vorton „unu“ vokalfinita kaj dusilaba, dum ke ĉiuj aliaj ĉefnumeraloj (ĝis „mil“) estas unusilabaj?

Ĉar „unu“ havas krom sia numeralo funkcio ankoraŭ alian, kiu postulas, ke ĝi estu deklinaciebla. En la esprimo „(la) unuj... (la) aliaj...“ la vorto „unu“ ne estas numeralo, sed (adjektiva aŭ substantiva) pronomo kun simila signifo kiel la pronomo „iu“.

Oni povas supozoj, ke Dro Zamenhof, donante al „unu“ finvokalon *u* kaj ne — ekzemple „a“, pensis al la pronomserio kun la sama finvokalo, kiun ankaŭ havas jen adjektivan, jen substantivan karakteron.

Ni rigardu ekzemplan frazon: „*Inter la poetoj (la) unuj estas superŝutataj per honoroj, dum (la) aliaj devas morti pro malsato.*“ Anstataŭ tio oni povas, ne ŝanĝante la sencon de la frazo, diri: „*Int. l. poet. iuj (aŭ kelkaj aŭ kelkiuj) estas superŝutataj per hon., dum ke aliaj dev. morti pro mals.*“

Jam el tio evidentiĝas, ke „unu(j)“ ĉi tie ne estas nombro. Sed — ĉu ĝi iĝas nombro, se ni uzas la singularon de „unuj“? Certe ne! kaj tiom pli ne, ke per la singularigo la senco de la frazo estas apenaŭ tuŝata: „*Int. l. p. la unu estas superŝuta/a per honoroj, dum la alia dev. m. p. mals.*“ Ĉu tio signifas, ke nur unu (= 1) sola poeto havas tiun sorton, kaj unu (= 1) alia ĉi tiun?

Nun ni faru nian frazon aktiva! „*Int. l. p. oni superŝutas la unujn per hon., dum ke la aliajn oni lasas morti pro malsa o.*“ Neniu dubus, ke ni devas doni ĉi tie al unuj, same kiel al aliaj, sian akuzativan „n“.

Ĉar ni tute ne pensas pri iu certa nombro, ni povas sendaŭgure singularigi nian aktivan frazon, forprenante nur la pluralan „j“: „*Int. l. p. oni superŝutas la unun per hon., dum ke la alian oni lasas m. pr. mals.*“ Stranga estus regulo, se ĝi ekzistus, kiu malpermesus al ni, doni al ĉi tiu „unu“ sian bone merititan akuzativan „n“. Tia regulo starigus escepton en nia lingvo, per nenio (ol eble per la konsidero al iuj nepensemoj) pravigeblan. Ĝi povus eĉ naski dusencaĵojn: „*La gardistoj helpis unu post la alia*“ havas tute malsaman sencon ol:

„*La gardistoj helpis unun post la alia*“. Nun ni rigardu la frazojn el la artikolo „*Pri la Lingvaj Respondoj de Dro Zamenhof*“ („La Vendreda Klubo“, Leipzig 1921, pĝ. 49/63), el kiuj unu mirigis samideanon Rippel. (Esp.-Prakt. 1921, pĝ. 197 maldekstre.) „*Estas pli oportune, vidi la...* Respondojn unun tuj post la alia, ol devi serĉi la unun en unu, la alian en alia libro.“ (pĝ. 55/56) — „*En ĉi tiu kazo oni uzu la unun, en tiu kazo la alian esprimon*“ (pĝ. 57) — (Estas nomataj diversaj aŭtoritatoj:) „*kelkfoje okazas, ke sekvante la unun, oni ricevas rezulton, kiu pli-malpli ofendas la alian* (pĝ. 62). — En ĉiuj ĉi kvar kazoj la vorto „unu“ korespondas kun „alia“ kaj ne estas nombro, sed pronomo same, kiel ĝia kore-

*) Vidu ankaŭ n-on 4, p. 83.

sponda vorto. La harmonio de la tuta frazo estus ĝenata, se oni rifuzas al unu vorto sian akuzativan finaĵon kaj donus ĝin al la alia.

Eble la akuzativo de la vorto „unu“ sonas strange en la oreloj de iuj Esperantistoj. Sed en Esperanto la nekutimeco ne prezentas gravan kaŭzon por neuzado. Tio estas citaĵo el la *Lingvaj Respondoj* de Dro Zamenhof, kiu, kvankam li persone evitis la formon „unun“, tamen, se ni ilin uzas, neniel povus vidi en tio ĉi ian pekon kontraŭ la reguloj aŭ kontraŭ la komuna spirito de nia lingvo (L. R. I., 22; III, XIV).

Ĉu „enda“ estas fakte necesa?

Sole la „a(n)ta“- kaj „i(n)ta“-participoj estas bezonataj por formado de la ses tempoj verbaj. Sed ankaŭ la „ota“-participo estas necesa: por diferencigo inter du malsamaj signifoj. Ne estas egale, ĉu oni diras ekzemple „la tasko estos solvata“ (jen la vera futuro!) aŭ „la tasko estas solvota“. La unuan frazon mi povas traduki nur „Die Aufgabe wird gelöst werden“, pensante pri momento post komenco de la solvo, do **dum** — la duan „Die Aufgabe ist zu lösen“ aŭ „... soll gelöst werden“ (la solvota tasko = die zu lösende Aufgabe), pensante pri la nuna momento, **antaŭ** la solvo. Samā diferenco estas inter „mi estos solvanta la taskon“ kaj „mi estas solvonta la taskon“. La „onta“-participo estas ankaŭ bezonata, sed ne por formi la verban tempon futuran, ĉar por tio oni korekte uzas „estos... a(n)ta“.

Sendube en „estas... ota“ (germane „ist zu... en“) troviĝas kvazaŭ la ideo pri dev(ig)o aŭ neceso, (kiun oni ja volas montri per „enda“), kvankam ĉi tiu ne estas speciale esprimita en ĝi (kaj ankaŭ ne en la germana teksto). Aldonante la adverbon „nepre“ oni povas krome rimarkigi tiun devigon por tiuj, kiuj ne sentas aŭ ne komprenas ĝin. Tial mi ne vidas malĝustan (mis-)uzon en tia apliko de „ota“.

El ĉio ĉi sekvas la nebezonateco de „enda“. La enkonduko de ĝi (kaj ankaŭ tiu de „mis“ kaj „oz“) ne estas defendinda, ĉar tiuj afiksoj estas aplikeblaj nur en malmultaj okazoj, por kiuj la ĝisnunaj esprimmanieroj plene taŭgas. Ili ne respondas al vera bezono, sed sole pezigas la teorion de nia lingvo, ne donante rimarkindan utilon por la praktiko. Foriĝos baldaŭ el E. la ĉefprincipo de la „simpleco“, kiel jam diras K. J. Loy tute prave en recenzo pri E.-lernolibro, kiu enhavas multajn neoficialaĵojn.

Alfred Schmidt

Demandaro

(La respondoj estas donitaj de s-ro Karl J. Loy)

10. Ĉiam ankoraŭ mi renkontas en Esp-aj gazetoj, ne esceptante E. P., la mallongigon s-ro por sinjoro. Kial do oni ne ankaŭ uzas konsekvence s-rino por sinjorino? — Laŭ mia opinio povas esti ĝusta nur s-o = sinjoro kaj s-ino = sinjorino. La sama mallongigo estas ankoraŭ aplikebla ĉe kelkaj aliaj vortoj, ekz. direktoro, doktoro, profesoro, numero (dir-o, d-o, prof-o, n-o) ktp. Tiel ni ne nur pli multe konfirmus nian aserton, ke Esp-o estas logika, sed la red-o mem gajnus en ĉiu n-o kelkajn liniojn de plia spaco en sia tre ŝatinda revuo. (Rimarku ekz. la tre ofte aperantajn mal'ongigojn s-o kaj n-o.) Cetere la red-o de Esp-o Triumf., sekvinte mian konsilon, uzadas la supre de mi donitajn mallongigojn. Ĉu tio en E. P., nia nuna sola lingvista revuo, ne ankaŭ estas efektivegebla?

Fr. Pr.

Respondo: Oni ne konfuzu *konsekvencon* kaj *egaligemon*. Mallongigo devas esti ne nur mallonga, sed ankaŭ facile komprenebla. Tial ni skribas „s-ro“ kaj „s-ino“, kaj ne „s-o“ kaj „s-i-no“; „s-ino“ konservas 4 literojn el la plena vorto, „s-o“ nur 2, estus do pli malfacile komprenebla. Ankaŭ „red-o“ ne estas tuj komprenebla; unuamomente mi pensis, ke ĝi signifus „redakcio“. Tial mi preferas la malnovan metodon de mallongigo; la multaj papero kaj mono, kiuj estas malŝparataj en la hodiaŭa tempo, estas apenaŭ kompenseblaj per ŝparado de kelkaj literoj.

11. Kia diferenco estas inter *frapi* kaj *bati*?

Fr. F.

Respondo: Batado ĝenerale postulas pli grandan forton ol frapado. Oni batas malbonajn infanojn. Oni frapas la pordon, por kaŭzi malgrandan brueton, per kiu oni petas enirpermeson. „frapi“ signifas ankaŭ „auf-fallen“, „frapanta“ = „auffällig“.

12. Ni petas tradukojn por: a) Radiergummi, b) eingebildet (ne memfida, aroganta!), c) Seine Stimme schnappt über vor Zorn, d) Da mich niemand weckte, verschieb ich meinen Zug.

Fr. F.

Respondo: a) Radgumo (Christaller); b) 1. tromemfida, fieraca; 2. imagita, fiktiva, malreala, imageca; c) Pro kolero lia voĉo falsedas (derivita de neologismo: falsedo G Fistel(stimme), A faset(to), H falsete, F fausset, I fasetto); d) Ĉar neniu vekis min, mi ne atingis (mi preterdormis) mian vagonaron, mia vagonaro forveturis sen mi, mi preterlasis (transdormis) la forveturon de mia vagonaro, mi dormis tro longe por atingi mian vagonaron. Nun elektu tion, kio plaĉas al vi plej bone!

Diversaj informoj kaj petoj

Donacoj por E. P. (alvenintaj ĝis la 5a de Julio): Fr. Mayerhuber, Augsburg, 20.50 M.; Dr. A. Möbusz, Lübeck, 50.— M.; R. Horrisland, Kristiansund (Norvegujo), 5.80 M.; s-ro Fick, Neu-Zachun, 7.20 M. — Koran dankon al la afablaj nutrantoj de mia infano!
Friedrich Ellersiek

Bibliografio

La libroj ktp. signitaj per steleto estas haveblaj ĉe Esperanto-Verlag Ellersiek & Borel G.m.b.H., Dresden 1. Por mez- kaj altvalutaj landoj la montritaj prezoj altiĝas je 60% kaj 100% laŭ Esperanto-Katalogo kaj prezolisto.

Ricevitaj verkoj

(Recenzojn vidu en la literatura parto)

* **Sappl.** Hanns, prof. h. c.: Kiel oni fondas kaj organizas Esperantan Grupon? Kun aldono de statutoj por Esperantaj Grupoj. Dua, plibonigita kaj pligrandigita eldono. Graz [1922]: Paulus - Eldonejo. (32 p., 11 $\frac{1}{2}$ × 16 $\frac{1}{2}$ cm.) 5 M. ^[208]

Adresaro de la Internacia leterŝanĝado inter katolikaj gejunuloj (Ile). Eldonita de Mondjunularo Katolika (Moka). Graz [1922]. (11 p., 11 × 16 cm.) Prezo ne montrita. ^[209]

* **Streidt**, Georg: Esperanto - Lehrbuch für Volksschulen. Auf Grundlage der Anschauung und des Erlebnisses. In zwei Teilen mit 30 Bildern. Im Auftrage der Esperanto-Vereinigung Deutscher Lehrer und des Sächsischen Esperanto-Instituts bearbeitet unter Mitwirkung von Prof. Dr. Joh. Dietterle und Arthur Degen. Teil II: Oberstufe. Leipzig 1922: Ferdinand Hirt & Sohn, Esperanto-Abteilung. (56 S., 14 $\frac{1}{2}$ × 22 cm.) Kart. 20 M. ^[210]

* **Schönherr**, Karl, Lehrer: Ausführliches methodisches Lehr- und Übungsbuch des Esperanto zum Gebrauch beim Selbstunterricht und in Kursen. Ein Hilfsmittel vor allem für solche, die keiner fremden Sprachen mächtig sind. (15. Auflage) Dresden 1922: Ellersiek & Borel, G.m.b.H., Esperanto-Verlag. (VIII, 118 S., 13 × 21 cm.) 15 M. ^[211]

La **Sufero** de Germanoj apud la Rejno. Tradukita de geanoj de la Flensburga Esperantogrupo. Flensburg 1922. (15 p., 11 $\frac{1}{2}$ × 15 cm.) Prezo ne montrita. ^[212]

Diversaĵoj

Flugschriften der „Neuen Zeit“. Nr. 5: *Esperanto als Sprache der katholischen Jugendinternationale*. Von Prof. h. c. Hanns

Sappl. Herausgegeben von der Internationalen Katholischen Esperanto-Zentrale. Graz (Steiermark), Karmeliterplatz 5, (2 S., 15 × 23 $\frac{1}{2}$ cm.) Preis nicht angegeben.

Gazetoj

Gazetoj neesperantistaj kun Esperanto-angulo:

Nova Gazeto Kotomyjska. Pismo Zwiazku Mieszczanstwa Polskiego. Adr.: Stanislaw Luczecki, ulica Legionów 1. 10, Kolomyja (Polujo).

Worker's Dreadnought. For international communism. Adr.: E. Sylvia Pankhurst, 152, Fleet Street, London E. C. 4.

La Caravane. Bulletin mensuel des voyages en groupe. Adr.: G. Roy, professeur au Collège de Gaillac-sur-Turn (France).

Redakcia korespondo

Korespondantoj, kiuj deziras ricevi senperan respondon, bonvolu aldoni por tio al sia demando poŝtmarkon, afrankitan poŝtkarton aŭ respondukuponon.

A. D. en H. Ne estas nia tasko ekzameni, ĉu en iu kongreso aŭ laborkunveno oni parolas nur Esperante aŭ ankaŭ aliajn lingvojn. La ĉefa afero estas, ke la kunveno, pri kiu ni ricevas informon publikigitan, rilatas al Esperanto. Tio okazis en la laborkongreso, kontraŭ kiu vi protestas; do vi ne rajtas nei ĝian Esperantan karakteron. Cetere estas klare esprimite en la sciigo, ke ne temas pri granda kongreso, sed nur pri laborkongreso.

J. P. en P. Esperanto-Praktiko ne servas al iu partio. Pro tio ĉiu havas la rajton, esprimi en ĝi sian opinion. Neniu pretendu, ke nur lia opinio estas nepre ĝusta, ĉar precipe per tia pensado ekestas la politikaj bataloj inter la diversaj klasoj de la ŝtatanoj. Ĝis nun la komunismo, kies ano vi estas, neniel pravis sian pravecon; kontraŭe ŝajnas, ke la eksperimento en Ruslando jam nun havas alian rezulton ol tiun, kiun la idealistoj de l' komunismo volis atingi. Cetere la artikolo de Dro Baena tute ne estas kontraŭlaborista, sed la verkinto mallaudas nur la egoismon, kiu en la laboristaro ekzistas same kiel en la tielnomata burĝaro.

C. B. en T. Dankon pro via laŭdo pri E. P. kaj pro via atentigo pri la eraro en Poŝkalendareto. Pri ĉi tiu nia eldonejo jam antaŭe estis informita de diversaj flankoj. En la nova eldono la eraro ne plu ekzistas.

O. N. en E. La stilaj ekzercoj estos daŭrigataj en E. P. ĝis la fino de l' nuna jarkolekto. Poste ni verŝajne ŝanĝos la enhavon de la ezerca parto, farante ĝin tute internacia.

Salutojn al ĉiuj!

F. E.

Übungsteil für Esperantisten deutscher Zunge

Geleitet von Max Butin

Esperanto-Korrespondenz-Lexikon für Kaufleute

Von Max Butin und Friedrich Jahn

(8. Fortsetzung)

anhören

Hören Sie mich wenigstens an, bevor Sie abfällig über mich urteilen.

Ankauf

Wir halten die Zeit für den Ankauf von Getreide nicht für günstig.

Vor dem Ankauf von Bergwerks-papieren möchten wir zurzeit abraten. Vor Ankauf wird gewarnt!

ankaufen

Anker

Die Paloma liegt im Hafen von Hamburg vor Anker.

Ankerplatz

Anklage erheben

anklagen

jemand wegen betrügerischen Bankerrotts anklagen

Anklang finden

Die neuen Modelle haben bei der Kundschaft Anklang gefunden.

ankleben

anknüpfen (siehe anbahnen)

Anknüpfend an die Unterredung mit unserem Vertreter...

ankommen

Das Schiff ist mit seiner Ladung unversehrt angekommen.

Vor allem kommt es mir darauf an, die durch den Krieg unterbrochenen Geschäftsbeziehungen mit Ihnen wiederherzustellen.

Wir wollen es nicht auf einen Prozeß ankommen lassen.

Ob Sie etwas erreichen werden, kommt auf Ihre Geschicklichkeit an.

Es wird auf Ihre Konkurrenzfähigkeit ankommen, ob Sie auf meine Kundschaft rechnen können.

Worauf es ankommt ist, daß...

Gegenüber dem Vorteil kommt es auf die Unkosten nicht an.

Auf einen Tag kommt es nicht an.

aŭskulti

Almenaŭ aŭskultu min, antaŭ ol vi malfavore juĝos pri mi.

aĉeto

La tempon por aĉeti cerealojn (grenon) ni ne opinias oportuna.

Ni malkonsilas aĉeti minejajn akciojn nuntempe.

Oni avertas pri aĉeto!

aĉeti

ankro

La Paloma ankrumas en la haveno de Hamburg.

rodo

akuzi (kulpigi)

akuzi (kulpigi)

akuzi (kulpigi) iun pro trompa bankroto

plaĉi

La novaj modeloj plaĉas al la klientaro.

alglui, surglui

Rilatante al la interparolo kun nia reprezentanto...

alveni, dependi ktp.

La ŝipo nedifektite alvenis kun sia ŝarĝo.

Antaŭ ĉio estas grave pro mi, restarigi la komercajn interrilatojn interrompitajn per la milito.

Ni ne volas riski proceson.

Ĉu vi sukcesos, dependas de via lerteco.

Dependos de via konkurkapableco, ĉu vi povos havi min kiel klienton.

La ĉefa afero estas, ke...

Konsidere al la profito la elspezoj ne ludas gravan rolon.

Unutaga malfruigo (prokrasto) ne ŝanĝos la aferon (ne estos grava).

ankündigen

Die angekündigten Waren sind endlich eingetroffen.

Es ist dem Angestellten wiederholt angekündigt worden, daß er seine Entlassung zu erwarten habe, wenn er seinen Fleiß nicht verdopple.

Durch Telegramm wurde uns der Tod des Inhabers angekündigt.

Ankündigung

Laut Ankündigungen findet heute abend eine Volksversammlung statt.

Gemäß Ankündigung in der Zeitung ...

Anlage

Aus der Anlage wollen Sie ersehen, daß ...

Ich bezeuge Herrn N. N., daß er gute Anlagen für den kaufmännischen Beruf an den Tag gelegt hat.

Die Anlage einer Bahn nach X. ist seitens der Behörde geplant.

Für die Anlage Ihrer Kapitalien empfehlen wir Ihnen Aktien von Waggonfabriken.

Die Anlage einer Wasserleitung ...

anlangen (siehe ankommen, anbelangen)**Anlaß**

Es liegt kein Anlaß zu Klagen vor.

Beunruhigende Nachrichten gaben Anlaß zu Aktienverkäufen.

anlassen

Der neue Kommis läßt sich gut an.

Maschinen anlassen
das Feuer anlassen

anlässlich

Anlässlich des hundertjährigen Bestehens der Firma X. wurde eine Festschrift herausgegeben.

anlaufen (übel anlaufen)

La Paloma läuft den Hafen von Hamburg an.

Die Außenstände sind im letzten Jahre sehr angelaufen.

In der Angelegenheit könnten Sie übel anlaufen.

anlegen (s. a. unter Anlage)

Die Paloma wird in Las Palmas nicht anlegen.

Welchen Betrag wollen Sie anlegen?
Nach allem muß man annehmen, daß der Angestellte es darauf angelegt hat, Betrügereien vorzunehmen.

anonci, avizi, averti

La avizitaj varoj fine alvenis.

Oni ripete avertis la oficiston, ke li estos maldungata, se li ne duobligos sian diligent(ec)on.

Per telegramo (Telegrame) oni anoncis al ni la morton de l' ĉefo.

anonco, sciigo, avizo, afiŝo

Laŭ afiŝoj okazos hodiaŭ vespere popola kunveno.

Laŭ anonco en la ĵurnalo ...

aldono, kapablo, konstruo, investo, instalo
Bonvolu informi vin el la aldono, ke ...

Mi atestas al s-ro N. N., ke li montris bonajn kapablojn (bonan kapablecon) por la komercista profesio.

La estraro projektis la konstruon de fervojo al X.

Por la investado de viaj kapitaloj ni rekomendas al vi akciojn de fabrikoj por vagonoj.

La instalo de akvotubaro ...

kaŭzo, okazo

Por plendi ne estas kaŭzo.

Maltrankviligaj sciigoj kaŭzis vendon de akcioj.

kontentigi ktp.

La nova komizo kontentigas nin (estas taŭga).

ekfunkciigi maŝinojn
igi ekbruli la fajron

okaze (de)

Okaze de la centjara ekzistado de la firmo X. festskribo estis eldonita.

viziti, amasiĝi (fari malbonajn spertojn)

La Paloma vizitas la havenon de Hamburg.

La ŝuldoj de l' debetoroj en la lasta jaro tre amasiĝis (plimultiĝis).

En la afero vi povus fari malbonajn spertojn.

albordiĝi, pagi, konstrui, investi

La Paloma ne albordiĝos en Las Palmas.

Kiom vi volas pagi?

El (Lau) ĉio oni devas supozi, ke la dungito intencis fari trompaĵojn.

Anleihe (aufnehmen) (geben)

Die Gesellschaft beschloß, eine Anleihe unter Verpfändung des Grundbesitzes aufzunehmen.

anleiten**Anleitung**

Der Lehrling erhielt die erforderliche Anleitung durch den Buchhalter.
Befolgen Sie meine Anleitungen.

Anliegen

anliegend (siehe anbei)

anmaßen

Ohne mir ein Urteil über die Handlungsweise des Schuldners anzumaßen ...

sich ein Eigentum anmaßen

anmaßend**Anmaßung****anmelden**

Besuch anmelden
Konkurs anmelden

Anmeldungstermin**Anmerkung****annähernd (Adverb)****annähernd (Adjektiv)**

annähernder Preis

Annahme

Ihre Annahme trifft nicht zu.

Annahme verweigern

Annahmeerklärung

In der Annahme, daß ...

annehmbar**annehmen**

Ich nehme Ihr Anerbieten an.

Man nahm an, daß die Devisen fallen würden.

sich einer Sache annehmen

Announce (siehe Anzeige)**annullieren**

Da Sie die Lieferfrist nicht innegehalten haben, sehe ich mich genötigt, den Auftrag zu annullieren.

Annullierung**anonym**

Anonyme Zuschriften wandern bei uns grundsätzlich in den Papierkorb.

anordnen

Ich wünsche die Angelegenheit so erledigt zu sehen, wie ich es angeordnet habe.

prunto (pruntepreni) (pruntedoni)

La societo decidis pruntepreni monon, donante la fundan posedaĵon kiel garantian.

instrui**instruo, instrukcio**

La komerclernanto estis laŭnecese instruata de la librotenisto.

Sekvu miajn instrukciojn (Agu laŭ m'aj instrukcioj).

peto, demando, deziro**arogi**

Ne arogante al mi la rajton, juĝi pri la agmaniero de l' ŝuldanto ...

proprigi al si ion

aroganta, pretendema**aroganteco****anonci, deklari**

anonci viziton

deklari konkurson

templimo de l' anonco**noto****proksimume, ĉirkaŭe****proksimuma**

proksimuma prezo

supozo, akcepto

Via supozo estas maltrafa.

rifuzi akcepton

akceptodeklaro

Supozante, ke ...

akceptebla**akcepti, supoz**

Mi akceptas vian proponon.

Oni supozis, ke la devizoj malaltiĝos.

zorgi pri iu afero

anonco**nuligi**

Car vi ne atentis la livertempon (ne liveris ĝis la templimo), mi devas nuligi la mendon.

nuligo**anonima**

Principe ni jetas anonimajn skribaĵojn en la paperkorbon.

ordoni, disponi, aranĝi

Mi volas (deziras), ke la afero estu ordigata tiel, kiel mi ordonis.

Anordnung

Warum haben Sie gegen meine Anordnungen gehandelt?

Alle Anordnungen für die Jubiläumsfeier sind getroffen.

Ich kann meine Anordnungen nicht mehr umstoßen.

anormal

Die gegenwärtige Marktlage ist durchaus anormal.

anpassen (sich)

Der Kaufmann muß sich den Sitten der ausländischen Bezieher anpassen.

ordono, dispono, aranĝo

Kial vi kontraŭagis miajn ordonojn?

Ĉiuj aranĝoj por la jubilea festo estas faritaj.

Mi ne plu povas ŝanĝi miajn disponojn.

kontraŭnorma

La nuna konjunkturo estas tute kontraŭnorma.

adapti, akomodi (sin)

La komercisto devas adapti (akomodi) sin al la moroj (kutimoj) de la eksterlandaj aĉetantoj.

(Forsetzung folgt)

Stilistische Übungen

4. Aus: Die Räuber (La rabistoj) von Schiller, übersetzt von Dr. L. L. Zamenhof

Glaubt ihr, ich werde zittern? Geister meiner Erwürgten! ich werde nicht zittern. Euer banges Sterbegewinsel — euer schwarzgewürgtes Gesicht — eure fürchterlich klaffenden Wunden sind ja nur Glieder einer unzerbrechlichen Kette des Schicksals und hängen zuletzt an meinen Feierabenden, an den Launen meiner Ammen und Hofmeister, am Temperament meines Vaters, am Blut meiner Mutter. Warum hat mein Perillus einen Ochsen aus mir gemacht, daß die Menschheit in meinem glühenden Bauche brätet?

Zeit und Ewigkeit — gekettet aneinander durch ein einzig Moment! — Grauser Schlüssel, der das Gefängnis des Lebens hinter mir schließt und vor mir aufriegelt die Behausung der ewigen Nacht — sage mir — o, sage mir — wohin — wohin wirst du mich führen? Fremdes, nie umsegeltes Land! Siehe, die Menschheit erschlappt unter diesem Bilde, die Spannkraft des Endlichen läßt nach, und die Phantasie, der mutwillige Affe der Sinne, gaukelt unserer Leichtgläubigkeit seltsame Schatten vor. — Nein! nein! Ein Mann muß nicht straucheln. — Sei, wie du willst, namenloses Jenseits — bleibt mir nur dieses mein Selbst getreu. — Sei, wie du willst, wenn ich nur mich selbst mit hinübernehme. — Außendinge sind nur der Anstrich des Manns. — Ich bin mein Himmel und meine Hölle.

Wenn du mir irgend einen eingeäscherten Weltkreis allein liebst, den du aus deinen Augen verbannt hast, wo

Ĉu vi pensas, ke mi tremos? Spiritoj de miaj mortigitoj! mi ne tremos. Via korpreama antaŭmorta kriado, via sufokige nigra vizaĝo, viaj terure dismalfermitaj vundoj estas ja nur ĉeneroj de nerompebla ĉeno de la sorto kaj estas en dependeco de miaj senlaboraj vesperoj, de la kapricoj de miaj infanistinoj kaj edukantoj, de la temperamento de mia patro, de la sango de mia patrino. Kial mia Perillo faris el mi bovon, en kies ardanta ventro la homeco rostiĝas?

Tempo kaj eterneco — alforĝitaj al si reciproke en la daŭro de unu momento! Terura ŝlosilo, kiu fermas post mi la malliberejon de mia vivo kaj malfermas antaŭ mi la loĝejon de la eterna nokto, — diru al mi, ho diru al mi, kien, kien vi min kondukos? Fremda, neniam travojaĝita lando! Rigardu, la homeco falas senforte sub tiu ĉi bildo, la streĉeco de la surtera vivo malaperas, kaj la fantazio, la petolema simio de la sentoj, trompas nian kredemecon per iaj ŝrangaj fantomoj... Ne, Ne! Viro ne devas ŝanceliĝi! Estu kiel vi volas, vi sennoma transaĵo, — nur tiu ĉi mia „mem“ restu al mi fidela. Estu kiel vi volas, se mi nur kunprenos kun mi mian „mi“. Eksteraĵo estas nur la ŝelo de homo — mi mem estas mia ĉielo kaj mia infero.

Se vi lasos al mi por mi sola ian cindrigitan parteton de la mondo, kiun vi forpelis de viaj okuloj kaj kie mi

die einsame Nacht und die ewige Wüste meine Aussichten sind? Ich würde dann die schweigende Öde mit meinen Phantasien bevölkern und hätte die Ewigkeit zur Muße, das verworrene Bild des allgemeinen Elends zu zergliedern. Oder willst du mich durch immer neue Geburten und immer neue Schauplätze des Elends von Stufe zu Stufe — zur Vernichtung — führen? Kann ich nicht die Lebensfäden, die mir jenseits gewoben sind, so leicht zerreißen, wie diesen? Du kannst mich zu nichts machen — diese Freiheit kannst du mir nicht nehmen. Und soll ich vor Furcht eines qualvollen Todes sterben? Soll ich dem Elend den Sieg über mich einräumen? Nein, ich will's dulden. Die Qual erlahme an meinem Stolz! Ich will's vollenden.

Gebet unter dem grünen Banner

Zu Dir, o geheimnisvoll mächtige Klarheit,
Du Urkraft allkosmischen Webens,
Zu Dir, große Quelle der Liebe und Wahrheit
Und Born nie versiegenden Lebens,
Zu Dir, die Dich alle verschiedentlich wähen,
Doch alle im Herzen Dich fühlen, ersehnen,
Zu Dir, die Du schaffest, uns führest in Nöten,
Lass' heute uns beten!

Wir nahen Dir nicht mit dem Glauben der Ahnen,
Mit Dogmen und brennenden Kerzen:
Schon weicht der Glaubensstreit friedlichem Mahnen
Und herrscht nur das Dogma der Herzen.
Mit ihm, das gleicheigen von uns einem jeden,
Mit ihm, das voll Wahrheit, oh' Kampf, ohne Fehlen,
Nun stehen wir, Kinder der Menschheit, in Scharen
Vor Deinen Altaren.

Du schufest die Menschen so schön und vollendet,
Doch trennten sie kämpfend sich wieder;
Es würgen sich Völker, vom Hasse geblendet,
Es morden einander die Brüder.
Oh, wer Du auch sein magst, Du Kraft, Du geheime,
Erhör' unser Flehen, lass' sprießen die Keime
Der Eintracht und Liebe und gib wieder Frieden
Der Menschheit hienieden!'

Wir schwuren zu kämpfen, wir schwuren zu schaffen,
Zur Eintracht die Menschheit zu bringen.
Oh, stütze uns, Gottheit, lass' nicht uns erschlaffen,
Doch lass' uns die Schranken bezwingen;
Gib unserer Arbeit den göttlichen Segen,
Gib Kraft und Gedeihen dem eifrigen Regen,
Daß wider den Sturm in dem kampfwilden Reigen
Wir mutig uns zeigen.

havos nur solecan nokton kaj eternan dezerton, mi tiam la silentan dezerton loĝatigos per miaj fantazioj, kaj la eterneco donus al mi sufiĉe da tempo, por analizadi la konfuzitan bildon de la universala mizero. Aŭ eble vi volas, por ĉiam novaj naskiĝoj kaj ĉiam novaj lokoj de mizero, ŝtupon post ŝtupo konduki min al la neniigo? Ĉu la fadenojn de la vivo, teksitajn por mi en la transa vivo, mi ne povas tiel facile disŝiri, kiel ĉi tiun? Vi povas fari min nenjo, sed tiun ĉi liberecon vi ne povas forpreni de mi. — Sed ĉu mi devas morti pro timo de turmenta vivo? Ne, mi ĝin suferos! La turmento rompiĝu sur mia fiereco! Mi eltenos ĝis la fino.

Preĝo sub la verda standardo

Al Vi, ho potenca senkorpa mistero,
Fortego, la mondon reganta,
Al Vi, granda fonto de l' amo kaj vero
Kaj fonto de vivo konstanta,
Al Vi, kiun ĉiuj malsame prezentas,
Sed ĉiuj egale en koro Vin sentas,
Al Vi, kiu kreas, al Vi, kiu reĝas,
Hodiaŭ ni preĝas.

Al Vi ni ne venas kun kredo nacia,
Kun dogmoj de blinda fervoro:
Silentas nun ĉiu disput' religia
Kaj regas nur kredo de koro.
Kun ĝi, kiu estas ĉe ĉiuj egala,
Kun ĝi, la plej vera, sen trudo batala,
Ni staras nun, filoj de l' tuta homaro,
Ĉe Via altaro.

Homaron Vi kreis perfekte kaj bele,
Sed ĝi sin dividis batale;
Popolo popolon atakas kruise,
Frat' fraton atakas ŝakale.
Ho, kiu ajn estas Vi, forto mistera,
Aŭskultu la voĉon de l' preĝo sincera,
Redonu la pacon al la infanaro
De l' granda homaro!

Ni ĵuris labori, ni ĵuris batali,
Por reunuigi l' homaron.
Subtenu nin, Forto, ne lasu nin fali,
Sed lasu nin venki la baron;
Donacu Vi benon al nia laboro,
Donacu Vi forton al nia fervoro,
Ke ĉiam ni kontraŭ atakoj sovaĝaj
Nin tenu kuraĝaj.

Hoch werden das Banner, das grüne wir halten,
Des Guten, des Herrlichen Zeichen.
Uns segnet der Gottheit geheimnisvoll Walten,
Bald werden das Ziel wir erreichen.
Wir werden sie stürzen, die trennenden Schranken,
Und sie werden krachen und dröhnen und wanken
Und fallen — und Wahrheit und Liebe nur werden
Regieren auf Erden.

Übertragen von F. Zwach

La verdan standardon tre alte ni tenos;
Ĝi signas la bonon kaj belon.
La Forto mistera de l' mondo nin benos,
Kaj nian atingos ni celon.
Ni inter popoloj la murojn detruos,
Kaj ili ekkrakos, kaj ili ekbruos
Kaj falos por ĉiam, kaj amo kaj vero
Ekregos sur tero.

L. L. Zamenhof

Gedankensplitter

Das beste Kennzeichen eines Menschen ist nicht sein Beruf und seine Tätigkeit, überhaupt nicht seine Sachlichkeit, sondern sein im weitesten Begriff der Liebe aushaltendes Menschentum.

Lamprecht

Das Gesicht eines Menschen sagt in der Regel mehr und Interessanteres als sein Mund; denn es ist das Kompendium alles dessen, was dieser je sagen wird, indem es das Monogramm alles Denkens und Trachtens dieses Menschen ist. Auch spricht der Mund nur Gedanken eines Menschen, das Gesicht einen Gedanken der Natur aus. Daher ist jeder wert, daß man ihn aufmerksam betrachte, wenn auch nicht, daß man mit ihm rede.

Schopenhauer

Aforismoj

La plej bona karakterizaĵo de homo ne estas lia profesio kaj lia agado, entute ne lia realaĵemo, sed lia per (el) la amo sonanta homeco en la plej vasta ideo (kompreno).

Trad. P. T.

La vizaĝo de homo ĝenerale diras pli multe kaj pli da interesaĵo ol lia buŝo; ĉar ĝi estas la resumo de ĉio, kion ĉi tiu iam diros, estante la monogramo de ĉiuj pensado kaj aspirado de ĉi tiu homo. Krome la buŝo elparolas nur pensojn de homo, la vizaĝo penson de la naturo. Pro tio ĉiu estas inda, ke oni atente rigardu (observu) lin, eĉ ne parolante kun li.

Trad. P. T.

Bonvolu atenti!

La *kompleta* jarkolekto 1921 de E. P. estas elĉerpita. Ankoraŭ livreblaj estas nur nekompletaj ekzempleroj (t. e. sen n-o 10) por 20.—, 25.— kaj 40.— M (laŭ la landoj montritaj en la abonkondiĉoj) *afrankite*.

La eldonejo

Übungsaufgabe 6

Am Wettbewerb der Übungsaufgaben können **nur Abonnenten** des Esperanto-Praktiko teilnehmen. Bezieher, die das Blatt nicht unmittelbar vom Verlage erhalten, werden gebeten, ihrer Einsendung einen Bezugsnachweis beizulegen. Die Beteiligung ist kostenfrei; nur wer seine Arbeit berichtigt zurückgesandt wünscht, füge einen freigezeichneten, mit Anschrift versehenen Briefumschlag bei.

Die Lösungen sind bis zum 20. des nächsten Monats an die **Schriftleitung** (Ellersiek & Borel, G. m. b. H., Dresden-A. 1, Struvestr. 40) einzusenden. Zwei der besten Arbeiten werden mit Bücherpreisen im Werte von 15.— und 10.— M. bedacht. Wer einen Preis erhalten hat, kann außer Wettbewerb weiter teilnehmen und erhält, wenn seine Arbeiten dreimal hintereinander zu den besten gehören, einen Sonderpreis im Werte von 20.— M.

(Zu übersetzen)

Mutter Eva

(Aus: „Lehrreiche Geschichten“, aus alten Quellen gesammelt von Hans Gäfgen.)

Der liebe Gott wollte einstmals Eva besuchen, um zu sehen, ob ihr Haus und ihre Wirtschaft wohl im Stande seien. Als Eva aber den Herrn kommen hörte, schämte sie

sich, daß sie so viele Kinder hatte, und versteckte etliche ins Stroh, etliche ins Heu und etliche ins Ofenloch. Die hübschesten aber behielt sie um sich und putzte sie gar sehr.

Gott sah die geschmückten Kinder und sprach zu einem: „Du sollst ein König sein!“ Zum andern: „Du sollst ein Fürst sein!“ Und so machte er die andern zu Edelleuten, Bürgermeistern, Vogten und Amtmännern.

Als nun Eva sah, zu welch hohem Rang der Herr ihre Kinder erhob, sagte sie, daß sie noch mehr Kinder habe. Und sie brachte die andern, die ungeputzt und schwarz einherkamen.

Da sprach Gott zu ihnen: „Ihr sollt Bauern, Kuh- und Schweinehirten bleiben und den andern dienen.“

Da ward Eva gar traurig, und sie bereute, was sie getan.

Ergebnis der Aufgabe 4 aus Nr. 4

Unter den eingegangenen 10 Arbeiten waren die besten von Postdirektor *Bollermann*, Gelsenkirchen (1. Preis) und Lehrer *W. Gantzkow*, Berlin-Weißensee (2. Preis).

Die Gewinner werden gebeten, dem Verlag die gewünschten Bücher anzugeben.

Die folgende, etwas geänderte Übersetzung stammt von Herrn *Bollermann*.

Legendo kontraŭ la prunedonado¹ (forpruntado) de libroj

En la sepa jarcento p.² kr. (post kristo) en irlanda monaĥejo vivis monaĥo³ nomita⁴ Kilianus (Kiliano), kiu estis vastrondo fama pro (mondfama pro) la alta arto⁵, per kiu li sciis (scipovis) skribi kaj admirinde ornam⁶ (kolorigi) librojn. Kiam li iutage diligente laboris je la ornamaĵoj⁷ (prilaboris la . . . n) de Biblio, fariĝonta la plej bela de⁸ lia mano, li aŭdis la avertan (admonantan) vokon de l' morto. Kilianus, kvankam⁹ pia kaj sindona al Dio, tamen ne volis disiĝi de la valorega (ĉarmega) posedaĵo (trezoro), kies kolororaj¹⁰ paĝoj ekardis (arde ekbrilis) antaŭ li en la lastaj sunradioj. Li kaŝis la libron en sekreta¹¹ (malfacile trovebla) faldo de sia monaĥa vesto¹² (robo), en kiu poste laŭ la monaĥordena regulo¹³ li post sia morto¹⁴ estis enterigata (entombigata) (en kiu li post sia morto laŭ . . .). Oni ne trovis la libron ĉe li, kaj tial ĝi estis entombigata kune kun li. Kiam post tri jarcentoj la tombo de l' sanktulo estis malfermata, oni trovis la multvaloran¹⁵ libron de lia mano premenatan¹⁶ (premenata de . . .), kaj malgraŭ ĉiuj penadoj oni ne sukcesis liberigi¹⁷ la volumon el la

rigidaj ostaj fingroj. Nur kiam solena promeso estis farita¹⁸ (solene estis promesite), ke ĉi tiu Biblio neniam estu¹⁹ (estos) vendata, prunte- aŭ garantidonata (forpruntata aŭ . . .) aŭ fordonacata, la mortinta Kilianus cedis (komplezis) al la deziro (plenumis la . . .) de siaj vivantaj fratoj, kaj tiel la libromirindaĵo²⁰ (nun) estis konservata en la biblioteko de lia monaĥejo.

Anmerkungen

1. Prunti = leihen, borgen. Eingebürgert haben sich die klareren Formen: pruntepreni = entleihen und prunedoni = verleihen. — 2. Nur vier Einsender haben den Druckfehler im deutschen Wortlaut bemerkt. Es muß nach Chr. heißen. — 3. Auch: religiuo, wenn man „vivi“ vorstellt und das zweifache „monaĥ“ vermeiden will. — 4. Auch: nomata statt nomita. — 5. Lerteco = Geschicklichkeit. — 6. Auch: pentre ornam — 7. „Ornamado“ ist hier nicht zutreffend, denn der Mönch arbeitete nicht nur am Verzieren, sondern auch an den Verzierungen selbst. — 8. Von seiner Hand = seiner Hand (2. Fall), deshalb nicht „per“. — 9. Stilistisch unschön sind Bildungen wie: Tiel pia k. ankaŭ estis; zu frei: k. estis ja pia, sed tamen . . . — 10. Oder: kol'oraj-oraj. — 11. Verbergen auch: nerimarkebla, kaŝita; kaŝi kaŝita klingt aber schlecht. — 12. Im Wörterbuch von Verax ist auch „kuto“ verzeichnet, aber im Sinne von „Waffenrock“. — 13. Kongregacio = religia gildo paßt hier nicht. Dem Herrn Einsender ist sicherlich nicht bekannt, daß die katholische Kirche unter Orden und Kongregationen zwei verschiedene Begriffe versteht. Auch: regularo. — 14. Auch gut: mortinte — 15. Unschön: multekostan. Man muß nicht immer gleich an den schönen Mammon denken, der heute die Welt beherrscht. — 16. Hier lassen sich die Formen premenata und premenatan anwenden, je nach der Satzbildung; wortlautgetreuer ist premenata. Premenita ist unrichtig (das von seiner Hand umklammert werdende Buch; also Gegenwartsform). Ebenfalls brauchbar: firme tenata, spasme ĉirkaŭtenata, ĉirkaŭprenata. — 17. Ebenfalls: eligi. — 18. Mit wenigen Ausnahmen ist hier „farata“ statt „estis farita“ gebraucht worden. Die deutsche Form der Vergangenheit (Imperfekt) verlangt im Esperanto logischerweise die Anwendung des Plusquamperfekts (getan worden war). — 19. Je nach der Auslegung haben beide Formen ihre Berechtigung; besser ist aber jedenfalls „estu“. — 20. Nicht: mirakla libro. Um ein Wunderbuch handelt es sich gar nicht. Buchwunder will doch nur besagen, daß es etwas wunderbar Schönes war, ein herrliches Kunstwerk. Auch: admirinda libro. G. Ajal

Por la tempo post laboro (Ella bela literaturo)

Redaktata de Karl Minor

Legendoj pri Rûbezahl

Egidvorto

La legendo, la mito, la fablo, la fabelo, la parabolo estas kvazaŭ floroj, kiuj ornamas la nudan veron. La plej belaj partoj de la mondo, tie, kie la beleco de la naturo influas la fantazion, certe posedas legendojn. Tie, kie kreskas la ruĝa vinbero, oni rakontas la belan legendon de „reĝo Laurin“, kaj en la Harz-montaro, sub la dancejo de la sorĉistinoj, super la valo de la rivero Bode, vivas multe da legendoj: rakontoj de la bela Brunhilde kaj de la kavaliro Bodo. En ĉiuj arbarmontaroj vivas malgranduloj, feinoj kaj diversspecaj fantomoj! En „Riesengebirge“ vivas la maljuna montfantomo Rûbezahl*). Ankoraŭ hodiaŭ oni rakontas tie liajn petolaĵojn. En la montoj proksime de la „Sorĉoĝardeno de Laurin“ maljuna transsendatino rakontis al mi legendojn, en Riesengebirge maljuna serĉistino de aromaj herboj, kiu mem havis la mienon de montfantomo, sciigis al mi petolaĵojn de Rûbezahl, kaj en la valo de la Bode mi mem vidis la dancejon de la sorĉistinoj, ĝuste la 1an de majo, kiam ili fervore ekzercas siajn aerdancojn sur la balailoj. Aromoj, spicoj, gemoj, floroj vivas en la legendoj, kreskitaj sur la bela fundo de la montaro. Tio, kion rakontis la serĉistino de aromaj herboj, komenciĝis same kiel aliaj fabeloj: „Iam estis“.

La oraj fago-folioj

Iam estadis tre malriĉa vidvino. Iun belan tagon ŝi iris kun siaj du infanoj en la montaron, por serĉi bluberojn. Kiam la pala virino kaj la malsataj infanoj serĉis la berojn, subite Rûbezahl, la estro de Riesengebirge, elpaŝas el granda arbo. La fantomo rigardis la malgajan virinon kaj ŝiajn infanojn. Poste li diris, ke li volas doni al ŝi pli bonan objekton ol la berojn. Li prenis la korbon kaj ĵetis la enhavon sur la teron

*) La nomo Rûbezahl laŭdire signifas „rapo-denombranto“.

kaj anstataŭigis ĝin per fago-folioj. La nebulo estis densa en la montaro. La vidvino kaj la infanoj sentis kvazaŭ manon, kiu gvidis ilin sur la ĝustan vojon. La vento blovis, ili rimarkis la spiron de Rûbezahl. La vidvino kaj la infanoj estis iom timemaj, ĉar ne ĉiam la estro de l' montaro estas kontenta pri la homidoj. Ili genufleksis kaj konfesis siajn malgrandajn pekojn; la koroj estis puraj. Post la preĝo subite la nebulo dividiĝis iomete, kaj ili ekvidis sian hejmon. Ili rapidis hejmen. Alveninte en sia domo, ili malfermis la korbon; sed kiel granda estis ilia surprizo! La fagofolioj estis aliformitaj en puran oron.

La virino vendis la orajn foliojn kaj ricevis multe da oro. Sufiĉe da oro por aĉeti domon kaj bienon. Neniam plu la vidvino kaj ŝiaj infanoj suferis mizeron. Dankeme ili memoris pri la montofantomo Rûbezahl.

La ora sablo

Distingita sinjoro venis el granda ĉefurbo al Riesengebirge, por rigardi ĝiajn belecojn. Li estis ravata de la belegaj montoj, de la verdaj valoj, kaj tute ne rimarkis, ke en liaj botoj estis multe da sablo.

Alveninte en la migrantejo, li rakontis al fremdulo, ke Riesengebirge estas tiel bela, ke oni tute ne rimarkas la ŝtonojn kaj la sablon en la botoj; li trovis ilin nur poste, kiam li estis en la migrantejo. Inter la belaĵoj, kiujn la naturo donis al Riesengebirge, li tute ne rimarkis, ke la botoj estis plenigitaj de ŝtonetoj kaj sablo. La fremdulo fripone ridetis kaj opiniis, ke la montfantomo ĝojus pri tiu ĉi interparolado, se li povus aŭskulti ĝin. „Sciu, la montfantomo estas tre fiera pri siaj montoj, kaj eble la estro de la montaro transformos, dankema pro la admiro al la montaro kaj ĝia beleco, la ŝtonojn kaj la sablon en la botoj en putegan oron.“

La fremdulo foriris. Vespere la migranto demetis la botojn; kia granda surprizo! La botoj vere estis plenigitaj de oro! Ĉiuj ŝtonoj kaj sableroj transformiĝis

en oron! Certe la fremdulo, al kiu la migranto rakontis pri la beleco de la montaro, estis la montfantomo mem, estis la 'estro de Riesengebirge, estis Rübzahl.

La oraj terbuloj

Iam, antaŭ multaj jarcentoj, junulo venis el fremda lando al Riesengebirge, por kompletigi kolekton de mineraloj. Sur la plej alta pinto de l' montaro, la Schneekoppe (neĝpinto), li aŭskultis la legendojn pri la montfantomo. La junulo prenis kelkajn terbulojn kaj koro-digintajn ŝtonojn, por almeti ilin al la mineraloj. Li volis montri ilin al siaj amikoj kaj diri: „Vidu, estas eroj de la plej alta pinto de Riesengebirge, en kiu, oni diras, vivas la estro de la montoj Rübzahl.“

Alveninte en la hejmo, la junulo montris la terbulojn kaj la ŝtonojn al siaj amikoj: la mineraloj estis aliformitaj en oron, la ŝtonoj aliformiĝis en juvelojn. Tuj la amikoj de la junulo vojaĝis al Riesengebirge, por trovi en la regno de Rübzahl orajn trezorojn. Tion, kion la vojaĝantoj serĉis, la „oron“, ili ne trovis en la montaro. Pli valorajn trezorojn posedas la montaro ol oron aŭ juvelojn: ĝia pura aero redonas la sanecon! Korpan kaj animan sanecon! Tiun ĉi la vojaĝantoj trovis kaj ankaŭ trovis la „Goldene Aussicht“ („oran vidaĵon“, belega punkto en la montaro). Sen materiaj trezoroj, tamen feliĉaj, ili revenis hejmen, dankemaj pro la trezoroj de la silezia montaro.

La oraj pilkoj

Iam el granda urbo kelkaj knaboj migris en Riesengebirge. Sur bela herbejo ili ludis kun montinfanoj per pilkoj. Ili forgesis, ke la sunsubiro jam venis. Iliaj gepatroj jam estis en zorgoj pro la nereveno de la knaboj. Fine ili revenis, ĝojaj kaj vivoplenaj. La malgaja humoro de la gepatroj baldaŭ ŝanĝiĝis en grandan ĝojon! Ne nur la infanoj bonstaterenis sed ankaŭ dumilia vjĝla rakonto pri la beleco de l' montaro, la pilkoj, per kiuj ili ludis en la regno de Rübzahl, aliformiĝis en pilkojn el pura oro.

La scienculoj, kiujn oni demandis pri la bela transformiĝo, opiniis, ke la mont-

fantomo mem, aiformiĝinta en montinfanon, ludis kun la knaboj, donante al ili la orajn pilkojn kiel valoran memoraĵon. En alia maniero oni ne povis klarigi la rakonton. Aŭ estis neklarigebla miraklo, aŭ estis fabelo, aŭ Rübzahl, kiu, kontenta pri la admiro de la knaboj al sia montaro, aliformis la pilkojn en puran oron.

La kolorigaĵo de Rübzahl

Malbela maljuna fraŭlino, kiu estis tre babilema kaj babilis en malbona maniero pri ĉu persono, donis la komision, serĉi rimedon, kiu forigos ŝiajn sulkojn kaj variolcikatrojn. Ŝi volis posedi lilio-blankan haŭton. Ĉiam la iom maljuna fraŭlino esperis, ke ŝi akirus edzon; la duonon de la vivo volonte ŝi donus, se ŝi posedus fianĉon.

Ankaŭ la montfantomo aŭdis la rakonton pri la iom maljuna fraŭlino. Post kelke da tempo juna kuracisto prezentis sin al la maljuna fraŭlino kaj proponis sian rimedon por glatigi kaj blankigi la vizaĝon; rimedon tiel sukcesplenan, ke ne nur maljunaj fraŭlinoj juniĝos, sed ke eĉ la plej malbela beliga.

La flavhaŭta fraŭlino preskaŭ kisis la kuraciston pro tiu ĉi rimedo; volonte ŝi konsentis pagi tre altan prezon por posedi tiun rimedon. Post ne longe ili interkonsentis. La kuracisto ricevis la postulitan sumon, la fraŭlino ricevis la rimedon. Tuj post la foriro de la kuracisto la fraŭlino provis la ricevitan kolorigaĵon, esperante, ke la rimedo plibeligos ŝian vizaĝon. Ŝi revis, ke ŝi estos pli bela ol la junaj knabinoj, kiujn ŝi ĉiam enviis: ŝi revis pri haŭto simila al lilioj kaj rozoj. Domaĝe! Tiu ĉi revo ne plenumiĝis. Tre ofte vantecon estas punata. Sekvantan matenon, rigardante en la spegulon, ŝi vidis, ke ŝi havas tute nigran vizaĝon; ĝi estis nigra kiel tiu de negro! Ŝi rapidis al ĉiuj kuracistoj, sed ho ve! Neniu povis forigi la nigran koloron. Nun ŝi lernis esti kontenta pri neŝanĝebla sorto kaj bedaŭris sian vantecon.

La dancejo de Rübzahl

Apud la vojo al la Hain-akvofalo kuŝas bela herbejo, ĉirkaŭata de densverda arbaro. Iam la montjunularo festis tie

grandan dancadon. Oni dancis kaj ĝojegis. La orkestro-muzikistoj sidis sur la roko, kiun oni vidas je la dekstra flanko de la herbejo. Faŭnoj kaj pigmeoj dancis, dancadis... kaj provis kapti la nimfojn. Oni vidis la kapro-piedojn kaj la kornojn de la faŭnoj en lunhelaj noktoj. Nur unufoje impertinenta fremdulo kuraĝis alproksimiĝi dum la nokto al la dancoj. La faŭnoj kun terura ridado kaptis lin kaj dancis, dancadis, ĝis kiam la impertinenta fremdulo terenfalas morta.

Estas pli bone, vidi la dancojn de la montfantomo matene, ol danci dum la nokto en la kuniĝo de faŭnoj.

La vespertoj

Iam du ŝtelĉasistoj iris en la montaron por ŝtelĉasi. Rŭbezah! jam de kelke da tempo konis la du ŝtelĉasistojn kaj decidis, ke li volas forpeli ilin el Riesengebirge.

Vidante la du ŝtelĉasistojn, li alproksimiĝis en belegan tetron, flugis sur la branĉon de soleca betulo kaj komencis per forta voĉo voki per amkrio la tetrinon. La du ŝtelĉasistoj alproksimiĝis singarde kaj mortpafis la tetron dum ĝia amkanto.

Ili enpakis la tetron en tukon kaj kontente iris al la plej proksima trinkejo, por oferti al la trinkejmastero la tetron por bona prezo. Multaj el la ĉeestantaj gastoj amasiĝis, ĉar ili neniam antaŭe vidis tetron. Malfermite la tukon, la tetro estis malaperinta, kaj ĝin anstataŭis multe da vespertoj. Subite tiuj ĉi bestoj ĉirkaŭflugis en la ĉambro kaj disgratis la vizaĝojn kaj la harojn de la trinkejaj gemastroj kaj iliaj gastoj. Certe la ĉeestantoj provis rapidi el la gastejo. Tiu ĉi ŝerco plaĉis nek al la trinkejaj gemastroj, nek al la ĉeestantoj. Kolerege ili batis la du ŝtelĉasistojn, ĝis kiam ĉi tiuj ne plu povis sin movi.

Ili rimarkis, ke Rŭbezah! estis la iniciatinto de la puno. Neniam plu la du ŝtelĉasistoj provis malhelpi la amkanton de amanta tetro aŭ aliaj kreitaĵoj, kaj neniam ili ree ŝtelĉasis.

La amo kaj la montaro estas ŝirmataj de la montfantomo.

Renovigu vian abonon!

La parabolo pri la vaporŝipo

De Saŭed, la Saĝulo

Kaj iam mi venis al unu el la grandaj lagoj, sur kiu veturis vaporŝipo. Kaj mi pagis unu dolaron al la kasisto kaj veturis de unu urbo al alia, jes, mi veturadis de la tria matene ĝis la kvina horo de la posttagmezo. Kaj estis nur malmultaj vojaĝantoj surŝipe, kaj mi iris tien, kie al mi plaĉis. Kaj ĉiu el la viroj surŝipe afable parolis al mi, kaj ŝajnis, ke ĉio sur la ŝipo apartenis al mi.

Mi suriris la ventegferdekon, kaj la direktilisto diris al mi: „Bonvolu enveni.“ Mi do eniris, kaj li montris al mi, kiel ŝipo estas direktata kaj kiel estas sonorigataj la sonoriloj, kiuj transdonas al la maŝinestro la signalojn, ĉu li pluveturigu aŭ ekhaltigu, ĉu li veturigu rapide aŭ malrapide.

Sed kiam ni paroladis, jen alvenis unu el la vojaĝantoj, viro, kiun mi jam estis vidinta, kaj li ĝentile pri io demandis la direktiliston, kaj la direktilisto respondis malĝentile. Kaj la viro denove demandis, kaj la direktilisto ne respondis, sed montris al tabulo, sur kiu estis skribite: „Estas malpermesite, paroli al la viro ĉe la direktilo!“ — Poste mi iris en la pli malsuprajn partojn de la ŝipo, kaj mi parolis kun la maŝinestro. Kaj li montris al mi siajn maŝinojn, kaj kiel la radoj rotacias, kaj kiel la propulsoro*) veturigas la ŝipon — kaj dum ke ni paroladis, malsupren venis la sama vojaĝanto, kaj ili parolis al la maŝinestro, kaj la maŝinestro estis malaŭfabla kontraŭ li.

Kaj al kiu ajn parto de la ŝipo mi iris, mi tie vidis la vojaĝanton, kaj ĉie okazis la sama sceno. Jes, la viroj, tiom afablaj al mi, ili ĉiuj estis malĝentilaj kontraŭ li. Jes, kaj kiam venis la tempo de la tagmanĝo, la kuiristo envenis kaj malbenis lin ĉeeste de aliaj vojaĝantoj.

Kaj mi parolis al la kapitano de la ŝipo kaj diris: „Kiu do estas tiu bedaŭrindulo, kiun ŝajne ĉiu malamas, kaj kies mano — kiel la mano de Ismael — leviĝas kontraŭ la manoa de ĉiu alia homo, kaj kiu sola inter ĉiuj homoj surŝipe ŝajnas havi nenium rajton rilate al la ŝipo?“

„Tiu viro estas la posedanto de la ŝipo!“

Kaj la kapitano diris al mi, ke la ŝipo kostis dek mil dolarojn, kaj ke la pose-

*) G. Propeller, Schraube.

danto malgajnas dum ĉiu veturo, kaj ke li estis veninta surŝipen por ekscii, kial li perdas sian monon. Kaj ke ĉiu el la ŝipanaro sentas koleron kontraŭ li kaj malrespektas lin, ĉar li nur estas riĉa viro kaj neniom komprenas pri ŝipoj kaj ĉiam enŝovas sian diablan nazon en negocojn, pri kiuj li neniom scias. Jes, la kapitano diris, ke li kaj ĉiuj viroj surŝipe ekĝojus, se la maljuna stultulo iam falustransborden.

Nun mi meditis pri ĉi tiu afero. Ĉar la viro estis paginta dek mil dolarojn kaj posedis nenion krom ĉagreno kaj ofendo.

Nu, mi ja estis paginta nur unu dolaron, kaj ĉio sur la ŝipo apartenis al mi. Kaj kiam la ŝipo alboridiĝis, mi tute ne havis zorgojn. Mi ne bezonis demandi, ĉu la transveturo alportis gajnon aŭ perdon, ĉu la vetero morgaŭ estos bona kaj profitodona, aŭ ĉu ĝi estos ventega kaj fortenos la vojaĝantojn.

Kaj mi pripensis, kiom multe pli riĉa mi estas ol la riĉa viro, kiu pensas, ke la ŝipo apartenas al li. Jes, mi pripensis, kiom li trompas sin mem, ĉar li estis paginta dek mil dolarojn kaj posedas nenion, kaj mi, kiu estis paginta nur unu dolaron, nomis mia la ŝipon dum unu tago. Jes, kaj se morgaŭ denove mi tien iros kaj pagos plian dolaron, mi refoje povos aĉeti al mi la ŝipon.

Vidu, kiom mi estas riĉa kaj kiom estas malriĉa tiu viro, kiu devas alkalkuli al siaj dek mil dolaroj ankaŭ la malprofiton per karbo kaj salajroj kaj asekuro, kaj kiu posedas nenion — eĉ ne la respekton de tiuj, kiujn li nutras.

Kaj la spirito de la vivo diris al mi: „Estu singarda! Ne deziregu! Ĉar la homo, kiu estas pli riĉa ol vi, vidu: li estas pli malriĉa ol vi!“

Kaj mi sciis, ke tio estas vero. Kaj mi meditis pri ĉi tiuj aferoj.

Esperantigis Karl Minor

Anekdoto

Dum siaj lastaj vivmomentoj fama franca kuracisto estis ĉirkaŭata de pluraj el la plej eminentaj kuracistoj en Paris, kiuj ĉiuj konkuris per esprimoj pri lia bedaŭrinda situacio. „Ŝinĵoroj“, li subite diris, „ne tro kompatu min.

Mi postlasas tri grandajn kuracistojn.“ Kiam ili petegis lin, nomi ilin — ĉiu el ili esperis, ke lia nomo estos inter la tri — li mallonge diris: „Akvo, ekzercado kaj dieto.“

Vestfalia Kanto

Konata melodio

1. Vi gloru Rejnon kun fiero
Pro ĝia vinberuja font'; —
Sed ni naskiĝis, kie fero
Profunde kuŝas en la mont',
Sur rok' altiĝas abiar',
En val' sin paŝtas la brutar',
Kaj garde staras ĉe la dom'
La kverka arbo kiel hom'.
∴ Al vi eksonu nia kant',
Ho vestfalia hejmoland'! ∴
2. Ni ne facile kutimiĝas
Al dolĉaj vortoj, flata dir',
Kaj ne rapide amikiĝas
Kun iu renkontita vir';
Bonvena estas la fremdul'
Nur kun sincero en okul';
Parolo rekta al la kor':
Jen estas vestfalia mor'!
∴ Al vi eksonu nia kant',
Ho vestfalia hejmoland'! ∴
3. Kaj la knabino vestfalia
Kun okulsteloj en lazur'
Ne emas al flirtad' pasia
Pro nura distro aŭ plezur'.
De la danĝero la Ĉiel'
Ŝin zorge gardas per anĝel';
En ĝojo kiel en dolor'
Fidela restas ŝia kor'.
∴ Al vi eksonu nia kant',
Knabin' el vestfalia land'!“ ∴
4. Vin, „ruĝa tero“, gardu Dio,
Dum nia tuta vivovojo'
Plenigas vi je harmonio
La bruston kaj je kora ĝoj'.
Ho Vestfalia, Dia verk',
Kun fort' egala al la kverk',
Vin benos eĉ en lasta hor'
Varmege nia danko kor';
∴ Kaj ĉiam sonos nia kant'
Al vestfalia hejmoland'!“ ∴

Trad. Pillath

Enigmoj kaj problemoj


Taskoj solvotaj

No. 12: Ĉevaliro

nan	li	Ki	ton	Es	du	vo	ga
sin	De	to	men	u	ze	pe	Di
Ke	bo	per	gvo	De	to	la	las
El	pli	ĉi	re	gi	lin	ru	ran
a	kō	En	fek	e	u	sin	ko
kaj	ler	vu	ti	la	ti	to	do
mi	daŭ	Fre	gi	la	ĝu	ri	ĝo
siek	Pli	a	bal	de	ji	al	I

Eu a'd Janischowsky

No. 13



El po 4 pecoj
kiaj la du fi-
guroj apudaj
formu kva-
draton.

Dr. Reinhart, Essen

Solvaj el kajero 5

No. 10

galo, galono, galero, galopo, galanto,
galantino, galeno, galiono, galvano, lago.

No. 11

l	a	k	e
a	l	u	d
k	u	r	i
e	d	i	f

Libro-recenzoj

Oni sendu po du ekzempleroj de ĉiu recenzota verko. De verkoj, pri kiuj la redakcio ne intencas publikigi recenzon, ĝi resendas la duan ekzempleron. La verkoj ktp. signitaj per steleto estas haveblaj ĉe **Ellersiek & Borel G.m.b.H., Dresden-A. 1.** (Bibliografiajn notojn kaj prezojn vidu en Germana Esperantisto.)

Malnova fablo rakontas, ke iam Ezopo estis sendata al la foirejo por aĉeti tion plej bonan, kio tie estis vendata. Li aĉetis langojn. Alian fojon li ree estis sendata al la foirejo por aĉeti tion plej malbonan tie vendatan, kaj li ree alportis hejmen langojn, klarigante, ke la lango estas tio plej bona kaj samtempe tio plej malbona, kio ekzistas.

Mi konas viron, kiu, laŭ mia opinio, estas mia plej bona amiko kaj la plej malamata de mi homo: la leterportisto. Kiam li alportas por mi bonaĵojn, mi povus lin ĉirkaŭpreni. Kiam li preteriras mian loĝejon, mi povus lin murdi.

Antaŭ kelkaj tagoj mi eksentis amon kontraŭ li: li alportis paketon; kaj kiam mi malfermis ĝin, mi trovis en ĝi 6 Esperantajn verkojn de 6 aŭtoroj, apartenantaj al 6 malsamaj nacioj.

La unua estas eldonita en Osaka (Japanujo) kaj havas la titolon **Esperanta Legolibro kaj Krestomatio de T. Chif**. Ĝi estas 253-paĝa verko, enhavanta legaĵojn de serio da konataj kaj nekonataj Esperantaj verkistoj, prozaĵojn kaj poeziaĵojn. La tuta enhavo, de la komenco ĝis la fino, estas nepre unuaranga. Precipe mi menciuj, ke la poemoj estas senescepte modelaj! La libro komenĉiĝas per antaŭparolo en japana lingvo, kiun, bedaŭrinde, mi ne komprenas, kaj sur ĉiu paĝo troviĝas pietnoticoj pri la Esperanta teksto en japana lingvo, kiuj estas por mi volapükajo. Kiel jam supre dirite, mi bedaŭras mian nekomprenon ĉi-riilate, precipe pro tio, ke sur pĝ. 47 al mi do estas nekomprenebla la traduko de la vorto „emanajo“, kaj mi volonte sciuj, kion ĝi signifas. Ĉu tio eble estas preseraro? La libro ja ĉe-havas folion surhavantan ne malgrandan kvanton da preseraroj kun ties korektigoj. Sed sur tiu folio mi ne trovis ĉi tiun „literaron“. Tamen: ankaŭ tio ne estas pruvo, ĉar mi trovis en la libro multe da

preseraroj, ne menciitaj sur la folio. Kun bedaŭro mi konstatis, ke la presejo de la libro aŭ ne sufiĉkvante aŭ tute ne posedas supersignitajn literojn. Tial la supersignoj en la libro estas aparte kompostitaj, kaj la supersignaj literoj staras aŭ malrekte, aŭ la supersignoj estas tute ne videblaj. Tio malhelpas la ĝuon precipe pri „La sanktejo de l' scio“, kiu estas apenaŭ komprenebla por komencantoj pro la tiom ofta foresto de supersignoj.

Sed ĉio ĉi estas nur teknikaj malmeritoj. Laŭ literatura kaj instrua vidpunkto la libro povas fiere stariĝi apud „Tra la mondo“.

* **Mondo kaj Koro** havas Hungaran aŭtoron, *K. de Kalocsay*, de kiu oni jam legis multajn poemojn en nia gazetaro. Sendube li havas poeziajn talentojn kaj senton. Precipe la unua poemo de la volumo, „Sonorilludo“, enhavas belan poezion, bonajn rimojn kaj potencon ritmon. La du-kaj trioblaj rimoj — ofte ene de la sama linio — pravas perfektan estradon da nia lingvo. Sed kiel tiu majstreco estas interakordigebla kun la multnombraj malbonaj kaj malbelaj rimoj en aliaj poemoj de la volumo? (sablo — kadavro, ekmontras — fulmotondras, korpaj — orfoj, naivan — sensoifan, ktp.) Multajn bonajn kaj belajn poemojn mi jam legis en Esperanto, sed neniam mi trovis Esperantan poemvolumon, kiu entute estis modela. La samo koncernas la volumon **Francaj Poezioj** de *J. Balliman*. Ankaŭ ĉi tiu kajero enhavas kelkan perlon, sed same multajn senvalorajn. En la antaŭparolo la aŭtoro diras: „... miaj versoj estas regulaj laŭ akcenta versfarado, sed por bone aŭdi francan ritmon, estas necese, elparoli ilin laŭ mia metodo.“ Tradukantoj de nacilingvaj poezioj ja troviĝas en dilemo, ĉar pli-malpli necese estas, konsideri la karakterizecojn de la originaloj, sed neniam aŭtoro rajtas postuli elparoladon „laŭ mia metodo“, sed li scipovu konsideri la originalon kaj samtempe submeti sin al esence *Esperanta* metodo. Legado de poezio ne estu laboro, sed ĝuo.

* **Ama Stelaro** de *La Forgesito* enhavas originalaĵojn de la laŭŝajne Portugala aŭtoro kaj tradukaĵojn el la Portugala lingvo. La enhavo konsistas el rakontoj, unuaktaĵoj kaj poezioj. La stilo de la prozaĵoj estas nepre modela. La enhavo de la rakontoj — interesege. La unuaktaĵoj estas plaĉaj kaj spritaj. Sed la poezioj estas senvaloraj, laŭ mia opinio.

Anekdotoj pri Dante estas rakontataj de *B. kaj E. Migliorini*. Ili mem diras, ke „la malgranduloj, la ĉiutagaj homoj, estas baldaŭ forgesataj, kaj la anekdotoj, kiujn oni rakontas pri ili, estas pli-malpli oportune aldirataj al plifamuloj.“ El tiu vidpunkto oni prijuĝu ja historian valoron de la verketo. Sed kon-

siderante ĝin kiel Esperantan literaturaĵon, oni devas konfesi, ke ĝi estas nepre valora. La stilo estas simpla kaj bona. Kaj krom tio la verketo havas la meriton, peri al ni karakterizan Italan spriton. Interese estus, science pritrakti la ekeston de rideto kaj ridado, la transformiĝon de la pure spirita kaŭzo en la korpan agadon. Mi devas konfesi, ke ĉi tiu procedo tute ne estas klara al mi. (Eble iu sciencula samideano iam donos al mi klarigojn pri tiu demando!) Mi scias, ke ekzemple la aŭdsento de anoj de malsamaj gentoj kaj rasoj malsame funkcias. La kokoriko estas aŭdata de Germanoj kiel „kikeriki“, de Francoj kiel „kokoriko“ ktp. Koresponde: rakontajeto povas efiki sur Italon kiel spritaĵo, sed tute ne ridetigas Germanon. Mi ne eldiras tion por aserti, ke la anekdotoj pri Dante ne ŝajnas al mi spritaj! Male: mi ridis pro multaj el ili. Sed ĉe aliaj mi klare eksentis: jen estas Itala sprito, kiu tamen estas kaj restas tia, sed kiun vi ne komprenas! Kaj sekve mi komencis mediti pri la ekesto de la ridado, ktp. Ĉu do anekdotaro ne estas multvalora, se ĝi parte ridigas kaj parte medigitas pri altaj sciencaj demandoj?

Pri alia alte scienca (muzikscienca) problemo pripensis min la broŝuro **La demando pri la plibonigo de la Muzikskribo kaj ĝia solvo por la Aŭtonoma Muziknotado**, kiu havas Belgan aŭtoron *L. Cogen*. Kompreneble tiu broŝuro laŭenhave povas interesi nur muzikiston, muzikanton aŭ muzikumulon. La aŭtoro petas je la fino, ke „ĉiuj Esperantaj gazetoj bonvolu, se ne repressi, almenaŭ preparoli aŭ resumi la ĵus legitan broŝuron“. Mi ne preparolos, nek resumos ĝin. Mi legis la broŝuron kaj trovis, ke ĝi trete detale pritraktas la demandon pri la ĝisnuna muzikskribo. Sed tiu ĉi parto estas tiom interesa, ke mi verŝajne publikigos/ eltranĉaĵon el ĝi en unu el la venontaj numeroj de *E. P.* Pri la solvo por la Aŭtonoma Muziknotado la broŝuro parolas nur supraĵe. Ĉu tio estas mallaŭdindaĵo aŭ laŭdinda saĝa intenco? Sur min ĝi efikis kiel tio lasta: En mi vekigis la scivoleco pri „broŝuro, en kiu la A. M. N. estos klarigata pli detale“, kaj kiu „baldaŭ aperos en lingvo Esperanto“. —

Do unu post alia, parte eĉ samtempe, mi legis ĉi tiujn 6 verkojn de 6 malsamnacaj Esperantaj aŭtoroj. Kaj mi devas konfesi, ke mi apenaŭ tie aŭ ie rimarkis ian nacilingvan influon en la stilo. Se mi ne scius per la lokoj de eldono kaj nomoj de la aŭtoroj, ke ili estas malsamnacianaj, mi ĝenerale nur povus konstati diferencon en la grado de lerteco de unu aŭtoro aŭ alia. Ja, mi devis singarde diri pri „Ama stelaro“, kies aŭtoro elektis pseŭdonimon, ke estas „laŭŝajne Portugala aŭtoro“, kaj tiun konjekton mi ne ĉerpis el la stilo, sed el la fakto, ke la tradukitaĵoj estas el Portugallingvaj originaloj.

Tia estas hodiaŭ la stato de nia lingvo kaj ĝia literaturo. Kiu do arogas nomi ĝin malviva lingvo aŭ eĉ ĵargono?

Karl Minor

Hauff: La Karavano. Trad. J. W. Eggleton. Stranga sento min atakis, kiam mi ricevis ĉi tiun libron por recenzo, kaj rememoro en mi vekigis: Estis antaŭ unu jaro. Mi tiam ne sciis, ke ekzistas traduko de tiu Germana verko. Mi komencis traduki ĝin kaj nur poste pri tio informis la ELA-n. Kaj kiam mi sidis super la neta kopiado de la lasta paĝo de mia traduko, jen alvenis letero, sciiganta al mi ke traduko jam ekzistas kaj ke do mia tuta laboro estis vana! — Se iu ion verkis, li ĝenerale opinias, ke lia verko estas bona. Ankaŭ mi havas bonan opinion pri mia traduko de „La Karavano“. Tamen mi volonte konfesas, ke la traduko de J. W. Eggleton estas same bona kiel la mia. Kaj ĉar mi kredas, ke tia verko havas nur la celon, utili al la Esperantanaro, mi ne bedaŭras mian vanan laboron, leginte la tradukon de Eggleton. Male: Mi ĝojas pri la traduko de Eggleton kaj povas tutkore rekomendi ĝin al la samideanaro.

Karl Minor

Hogg: La Eksperimento de Eccles. Oni multe skribis pri ĉi tiu eksperimento; oni laŭdis ĝin, kaj ankaŭ mi taksas ĝin imitinda. Mi ja kredas, ke laŭscienca — aŭ almenaŭ laŭgramatika — nacilingva instruo de fremda lingvo ĝenerale estas pli rekomendinda, ĉar ĉio pli firme enmemoriĝas, se oni ne nur lernas „tiel vi tion esprimu!“, sed se oni lernis kompreni „tio devenas de tio, kaj tial ĝi estas tia!“. Sed sendube ne estas facile, klarigi al infanoj kaj ne-instruitoj la gramatikajn interrilatojn, kaj por la instruo al tiaj mi opinias tre rekomendinda la metodon de Eccles (en Germanujo oni pli kompreneble nomus ĝin „la metodo laŭ Berlitz“). kiun, rilate al Esperanto, modele klarigas la lerta aŭtorino. *Karl Minor*

Rakontoj el la Biblio. Trad. Dro L. L. Zamenhof. Zamenhof, laŭ mia opinio, estis nia plej granda stilisto (kvankam mi ne nepre nek blinde aprobas ĉion, kion li skribis), kaj la Biblio estas — laŭ stilista vidpunkto — la plej simpla verko de la mondliteraturo. Krom tio Zamenhof verkis sian tradukon de la Biblio ne en la komenca epoko de nia lingvo. Tial ĉiam kun speciala ĝuo mi legas „la Zamenhof-an Biblion“. Kaj se oni ĝin legas atente, t. e. studas, oni ĉiam denove povas lerni el ĝi imitindajn formojn kaj esprimojn. Mi citas nur kelkajn el la „Rakontoj el la Biblio“: „vizaĝaltere“, „detempe de“, „ili starigis tendare“, „kiu savis min kontraŭ (!) leono“, ktp. — Menciindaj krome estas du vortoj, kiuj ŝajnas

novaj al la leganto: efo („prenu por viaj fratoj ĉi tiun efon da rostitaj grajnoj“) kaj siklo („la pezo de la kiraso estis kvin mil sikloj da kupro“). Efo estas antikva mezurunuo, kiu nomiĝas same en la hebrea originalo. La vorto *siklo* estas Zamenhof-a esperantigo de la hebrea vorto „šekel“, kiu estas pezunuo por arĝento. Ĉi tiu vorto estas precipe atentinda pro tio, ke alia tradukanto eble malpli strange esperantigus la hebrean vorton per „šeklo“.

Karl Minor

Page: Unua kursa legolibro. Tempopasiga, ofte ridetiga kaj ĉiam bonstila estas ĉi tiu spritajaro. De la komenco ĝis la fino oni ĝin legas, ne faletante pro strangaj naciismaj aŭ arbitraj formoj. Krom tio ĝi ne estas tro ampleksa, do vere leginda libreto, kiu alportos iom pli da vivo kaj lumo en la kurajn lecionojn. *Karl Minor*

Himnaro Esperanta. Antaŭ iom pli ol unu jaro mi publikigis en E. P. longan artikolon pri la Esperantigo de literaturaj verkoj, kaj en ĝi mi tre detale parolis pri la diferenco inter poemo kaj kantaĵo. Mi tie diris, ke traduko ĉefe konsideru la ritmon de la originalo, kaj ke kantaĵo unuavice atentu la melodion. Mi devas konfesi, ke mi ne konas la plejmulton el la melodioj de la kantaĵoj entenataj en ĉi tiu volumo. Mi do nur povas juĝi ilin kiel poezion; kaj el tiu vidpunkto ili estas senripoĉaj. La ritmoj estas fluaĵ kaj la rimoj perfektaj. Krom tio la aranĝo kaj formato de la volumo estas tre praktikaj. *Karl Minor*

Merchant: Tri angloj alilande. Jen beleta romano originale verkita en Esperanto. La enhavo estas simpla, bonhumora, kaj la valoro de la verko ja pruvas la fakto, ke la unua eldono rapide elĉerpiĝis kaj la intereso pri la libro necesigis duan eldonon.

Karl Minor

La eliro de ĉi tiu kajero bedaŭrinde prokrastiĝis pro striko de la preslaboristoj.

La venonta numero eliros nur en Septembro; ĝi enhavos raporton pri la Internaciaj Kongresoj.

Anoncetoj

Korespondado kaj interŝanĝo

Tarifo: Unu enpresio (= du linioj) 6.— M.; ĉiu plia linio 3.— M. — Rabato: 10% por 3 enpresoj, 20% por 6 enpresoj, 30% por 12 enpresoj.

Mallongigoj: L = leteroj; PK = poŝtkartoj; PI = poŝtkartoj ilustritaj; bfl = poŝtmarkoj sur bildflanko; PM = poŝtmarkoj; ES = Esperantaj sigelmarkoj; EG = Esperantaj gazetoj; HM = helpa mono; Kor. = korespondo; k. ĉ. l. = kun ĉiuj landoj; k. e. = kun eksterlandanoj.

Ĉeĥoslovakujo

Görkau. — S-ro Franz Hänsl, Untere Gasse 116: interŝanĝas Pl.

Germanujo

Dresden - Cossmannsdorf. — S-ro Curt Heinig, Kolonie 153: Pl bfl., L, k. e. l.

Ruslando

Astrahanj. — S-ro Bazilo Averin, 6 uĉ, 3 Bakalda No. 30: PM, EG., k. e.



Jen **5** ĉie fame konataj artikloj de germana industrio Kudromaŝinoj **NAUMANN,** Bicikloj **GERMANIA,** Skribmaŝinoj **IDEAL** por kontoroj kaj oficejoj, **ERIKA** por vojaĝo kaj privata uzado, Kalkulmaŝinoj.

Esperantistoj rekomendu ilin!

Akcia Societo Seidel & Naumann, Dresden

In 10 Stunden Esperanto

Von Sprachlehrinstituts-Direktor *F. L. Irmscher*
12. Auflage

Aus der Fülle der Besprechungen: Herr Lehrer Taubmann, Haida: „Dieses Werkchen müssen wir allen Kursusleitern empfehlen.“ — Herr Lehrer Rockmann, Magdeburg: „Ich betrachte Ihr Buch als das beste aller deutschen Esperanto-Lehrbücher.“

Preis: 12.— M., Schlüŝel hierzu 5.— M. [89]

Wittig & Schobloch, Verlagsbuchhandlung
Dresden-Wachwitz

PETO

Por formi grandan kolekton da Esperantaĵoj, mi volas aĉeti Esperantajn librojn, broŝurojn, gazetojn, poŝtkartojn, sigelojn, insignojn ktp. Ofertojn oni sendu al G. H. W. COTÉ, Weerdsingel W. Z. 56, Utrecht (Nederlando) [133]

Der schon seit Jahren sehnsüchtig erwartete

Neue Christaller

(Deutsch - Esperanto - Wörterbuch)

ist jetzt in Druck gegeben worden und wird, wenn nicht unvorhergesehene Hindernisse eintreten, bis Ende dieses Jahres erscheinen. Das Buch wird in **guter Ausstattung** — auf **holzfreiem Papier** gedruckt und in **abwaschbarem Leinenband** gebunden — herauskommen und **inhaltlich auf der Höhe sein**; hierfür bürgt der Name des Verfassers.

Bei der jetzigen Preisbewegung im Druck- und Buchbindergewerbe ist es aber unmöglich, schon jetzt einen Preis für das Wörterbuch festzusetzen. Wir wollen jedoch den privaten Käufern, die das Buch schon vor Erscheinen bestellen, einen wesentlichen Vorteil bieten. Zu diesem Zwecke haben wir eine

Vorbestellungsliste

eingerichtet mit der Maßgabe, daß jeder Privatkunde, der das Wörterbuch **bis zum 1. Oktober ds. Js.** bestellt und für **jedes bestellte Stück gleichzeitig 50.— M** einsendet, das Buch mit einem

Nachlaß von 20%

auf den derzeitigen Verkaufspreis geliefert erhält.

Für den Buchhandel hat diese Sondervergünstigung keine Gültigkeit.

Ellersiek & Borel ^{G.m.} Dresden-A. 1

Postscheckkonto: Dresden Nr. 127 81
Bankkonto: Gebr. Arnhold, Dresden-A.
Stadtgirokonto: Dresden Nr. 9822

Schuberts Sortiment, Breslau

Angulo de Garve- kaj Alexanderstrato
Telefona 11346 Ring

*

Esperanto-Librejo

havas riĉan tenejon de esperantaĵoj ĉiuj-
specaj. Akceptejo de gazetaĵ abononj.

Mi liveras ĉien. [85]

Samideanoj de Hamburg-Altona!

Aĉetu viajn

Esperantaĵojn,

librojn, stelojn, sigelmakojn, poŝtkartojn
ktp. kaj abonon viajn

Esperanto-gazetojn

elvenantajn en Germanujo kaj eksterlande

ĉe

KARL MINOR

Hamburg, Tresckowstraße 32

Ĉio sen ia speciala krompago! [79]

Varbu abonantojn por E. P.!

Der neue Otto

(Elementar - Lehrbuch zur
gründlichen Erlernung der
internationalen Hilfs-
sprache Esperanto v. Guido
Otto; vierte, neubearbeitete
und erweiterte Auflage)

ist

eins der besten

Lehrbücher

für Schulen und Kurse

Preis 20.— M

für mittelvalutige Länder
32.— M

für hochvalutige Länder
40.— M

Schlüssel dazu

Preis 12.— M

Ausland: 19.20 u. 24.— M
(s. oben)

Ellersiek & Borel

G. m. b. H.

Dresden-A. 1

Struvestraße 40



LEIPZIG-A FOIRO

La ĝenerala internacia Foiro de Germanujo

La unua kaj plej granda Foiro de la mondo.
Same grava por ekspozantoj kaj por aĉetantoj.

Ĝenerala Specimenfoiro kun Fairoj
por Tekniko kaj Konstrufako

Aŭtuna Foiro 1922 de la 27a de aŭgusto ĝis
2a de septembro:

Printempa Foiro 1923 de la 4a ĝis 10a de marto.



Informojn donas kaj aliĝojn akceptas la Fairoficejo
por la Specimenfairoj en Leipzig:

MESSAMT FÜR DIE MUSTERMESSEN
IN LEIPZIG